

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 3

Nv 1



1972

Nürnberg

N-ro 1

Enhavo

Artikoloj

La nuntempa situacio de la religia instruado en FRG	5
La lerneja instruado de la Internacia Lingvo	8

Informoj el la pedagogia vivo

Mediosavo en la lernejo	26
Porinstruista Esperanto-kurso en St. Andreasberg, Harz-Montaro	26
La edukado en Hispanujo	27
42-a Italia Kongreso de Esperanto	28
Eŭropa Edukado en la Industriigita Socio	28
Infanoj lernas Esperanton	31

Forumo

Asociitaj Lernejoj de UNESKO	32
Internacia Lerneja Korespondado	32

Dokumentado

La leĝo pri Esperanto-instruado en Aŭstrujo	33
---	----

La nuntempa situacio de la religia instruado en FRG

Reinhard Haupenthal

El la paletto de la nuntempaj lernejoj instruobjektoj neniu estas tiom diskutata hodiaŭ kiel la religia instruado (RI). Tio certe ŝajnas stranga al legantoj el landoj, kiuj ne konas lernejan RI. Tial, por komprenigi al ili tiun fenomenon ni en tiu ĉi artikolo donos koncizan prezenton de kelkaj esencaj faktoj pri tiu instruobjekto.

Jura situacio

La sola instruobjekto leĝe garantiita estas la RI. Ke tio estas por ĝi nuntempe pli danĝero ol sekuro, ni montros poste.

La konstitucio de FRG de 23. 5. 1949 diras: „En la publikaj lernejoj la religia instruado estas regula instruobjekto, escepte de la senkonfesiaj lernejoj. Netuŝante la ŝtatan kontrolrajton la religia instruado estas plenumata interkonsente kun la principoj de la religiaj komunoj. Neniu instruisto povas esti devigata kontraŭvole doni religian instruadon.“ (Art. 7) Simile sin esprimas leĝoj de la landoj kaj same la diversaj lernejoj leĝaroj.

El tio rezultiĝas, ke la RI estas malsama laŭ konfesioj, t. e. katolika kaj protestanta.

La partopreno estas deviga, krom se la gepatroj skribe malanoncas la infanon aŭ se la infano mem, atinginte sian 14an jaron (en Bavarujo, Rejnlando-Palatinato kaj Sarlando la 18an jaron), la daton de „religia memstareco“, deklaras sian eksiĝon. Iuj lernejoj leĝaroj lastatempe instrucas, ke por eksiĝintaj lernantoj ekde la 10a klaso devas okazi filozofia instruado.

Pro tio ke la reputacio de la kristanaj eklezioj ŝrumpas pli kaj pli kaj pro tio ke multaj infanoj jam devenas de postkristanaj gepatroj kaj plenkreskas en medio de kreskanta senkristaniĝo, la socia situacio, de kiu eliris la konstitucio de FRG jam estas historia. Ĝi estas fakte la situacio tuj post la milito, en kiu la eklezioj kiel preskaŭ solaj institucioj ĝuis sendisputan reputacion. Tamen la situacio esence ŝanĝiĝis: ideoj kaj ideologoj, religioj kaj ateismoj konkuras ankaŭ en FRG pro la favoro de la homoj. Tiu evoluo surprizis precipe la ekleziojn, kiuj ne plu kapablas sekvi la rapidegan evoluon kaj kroĉiĝas al tradicioj. Al tio aldoniĝas, ke ankaŭ interne de la teologioj multo, se ne ĉio komencis ŝanceliĝi aŭ almenaŭ submetiĝi al (ankaŭ publika) diskutado.

Konceptoj pri religia instruado

Ĉar pri la enhavo de la RI decidis la respektivaj eklezioj necesas unue plej koncize prezenti la diversajn postmilitajn konceptojn. La koncizigo necese sekvigas simpligojn.

1. La koncepto de evangelia instruado, kiu katolikaflanke trovas paralelon en tio, kion oni nomas „proklamo“ (de la evangelio)¹⁾ devas esti komprenata surbaze de la dialektika teologio de Karl Barth kaj la politika situacio de la Tria Regno. Tiam, ŝajnis, ke nur eklezie orientita instruado povas resti imuna kontraŭ ideologiigo. Post 1945 tia programo povis infiltrigi eĉ en la instruplanojn pro la aparta postmilita klimato: la admiro por la „konfesanta eklezio“ kaj la pretendo disponigi rimedon kontraŭ ideologia fremdiĝo. Oni sin apogis sur socion preskaŭ 100 %e kristanan kaj sur la gepatran rajton je kristana edukado de la infanoj.
2. De ĉ. 1958 elformiĝas nova koncepto, la hermeneŭtika RI, kies karakterizoj estas:
 - a) ĝia pedagogia-lernejteoria pravigo, kiu diras, ke tasko de la lernejo estas enkonduki en nian konkretan mondon per interpreto de la tradicio, kiun esence formis la kristanismo.
 - b) Tia instruado ne povas plu unuavice „alparoli“, „atesti“, „evangelizi“, sed ĝi estas „hermeneŭtika“, t. e. ĝi „interpretas“, „klarigas“, „komprenigas“. Tio signifas ĉefe adapti tradicion al nuntempo, do traduki.

¹⁾ germane: „evangelische Unterweisung“ resp. „Verkündigung“: du fiksaĵ terminoj en la religiopedagogia jargonon, al kiuj mankas en Eo tradiciaj ekvivalentoj.

- c) La centron de tia instruado formas bibliaj tekstoj. Pedagogie oni pravigas tian didaktikan bibliismon per tio, ke tiuj tekstoj estas plej antikvaj kaj fundamentaj kristanaj tradicioj kaj mem formis tradicion.

Ekde ĉ. 1968 okazis gravaj ŝanĝoj en la religiopedagogio. Jen ĝiaj ĉeftraĵtoj:

- a) Kreskanta graviĝo de la lernantoj postulas pritrakton de ties bezonoj.
 - b) El tio sekvas sinturno al aktualaj individuaj kaj sociaj problemoj.
 - c) Apertiĝo de la RI al la metodoj de curriculum-esplorado: forlaso de traktotaj „ŝtofoj“ kaj sinturno al lernocele orientita instruado sub la aspektoj de la „kio“, „kiel“ kaj „kial“ de la lernado.
 - ĉ) Kreskanta intereso pri la interplektiĝoj antropologia, teologia kaj sociologia de la fenomeno „religio“ kaj la provo tiamaniere legitimi la RI.
 - d) Pligraviĝo de religipedagogiaj institutoj kaj projektgrupoj. El tio rezultigis du konkretaj linioj, la problemorientita RI kaj la instruado pri (la fenomeno) religio.
3. La problemorientita RI volas demonstri la efikecon de la kristana kredo por la hodiaŭa mondo. Bibliaj eldiroj konfrontiĝu kun moderna mondpercepto kaj mondinterpreto. Laŭtema instruado orientiĝas ĉefe je problemanalizo, teologia reflektado kaj kolekto de materialoj. Ĉar preter la specife kristana temaro oni estas aperta por ĝenerale-religiaj fenomenoj eblus paroli ankaŭ pri „humanorientiĝo“.
4. Novan koncepton lastatempe evoluigis la P(edagogia) T(eologia) I(nstituto) de Kassel, kiu konscie pledas por „instruado en religio“. Kvar punktoj ludas decidan rolon:
- a) La lernejteoria pravigo. Ĉar religio celas fundamentajn demandojn de la homa ekzistado necesas klarigi tiujn demandojn kaj pripensi eblajn respondojn.
 - b) La ellaboro de teologie kaj religioscience legitima kompreno de religio superanta la religian nocion kaj religian malamikecon de la klasika religiokritiko kaj de la dialektika teologio surbaze de la teologio de Paul Tillich.
 - c) La orientiĝo laŭ la curriculum-esplorado.
 - ĉ) La emancipiĝa karaktero de la RI, kies celo estas:
 - (1) helpi al memstariĝo religia;
 - (2) montri kiel religia pensado, demandado, sinteno povas kontribui al memstariĝo kaj memdifino de la homo.

El tiu superrigardo fariĝas klare, ke la pli novaj — pedagogie kaj teologie pli raciaj — konceptoj ne plu atribuas dominan rolon al la ekleziaco de la RI. Aliflanke ĝisdate la eklezioj insistas pri sia konstitucie certigita rajto kaj tiel mem flankeniĝas de la evoluo kaj en la lasta linio fariĝos la plej grandaj malhelpantoj de progresiva RI.

La instruplanoj

Dum por la evangelia instruado ekzistas ankoraŭ diversaj (kaj diverĝaj) laŭlandaj aŭ laŭteritoriaj planoj, la katolikan instruadon direktas nun tutlanda plano aprobata de la episkoparo. Ĝia malkaŝa celo estas la integriĝo de la junulo en la eklezian aparaton. La eklezioj do misuzas la publikan institucion „lernejo“ por garantii al si novajn adeptojn. Ne mirigas, ke multaj el la formulitaj lernocejoj ne estas — didaktike-metodike — realigeblaj, sed restas plumpaj aspiroj, ekz.: profundigi la personan rilaton al Kristo, la altigita sinjoro (8a klaso). Plej katastrofa estas la plano por la 1a ĝis 10a klasoj (elementa lernejo), plene orientita je eklezia vivo, diservado, biblio, ktp.

Je tiuj aspektoj pli-malpli insistas ankaŭ la plej freŝdataj komunikoj de la episkopaj konferencoj, kaj — kvankam iom pli (ŝajn)progresiva — ankaŭ la sinoda papero. Eĉ se interne

de la eklezie orientita RI sub la premo de modernaj pedagogiaj teorioj oni ĉesas sin bari kontraŭ lernocele orientita instruado, tamen la didaktikaj konceptoj kaŝas sub novaj vestoj la malnovan varon.

Ĝenerale oni povas diri, ke la rezultoj de la religiopedagogiaj institutoj de la protestantaj eklezioj estas pli progresivaj kaj pli modernaj, kaj iom post iom penetras ankaŭ la „kato-likan“ instruadon, simple pro manko de konvenaj alternativoj. La mizero, en kiun pli kaj pli enĝlitis la RI postulas drastajn metodojn. Persone mi vidas nur la jenan alternativon: aŭ oni konservas la laŭkonfesian instruadon (tiam la elsekiĝo de tiu fako estas nur afero de tempo) aŭ oni forĵetos historiajn privilegiojn, kaj ĉiuj sociaj kungrupiĝoj formulos novajn enhavojn de la fako. Tiuj enhavoj vaste transiros la nunajn teologiajn konceptojn. Aliflanke ili ne devas degradiĝi al ia seka faktoscio, sed pli ol iam kaj pli ol aliafaze devas krei „disponblojn“, latentajn sintenopretecojn ĉe la juna generacio.

Tiajn kriteriojn konsideras la katalogo de lernoceloj evoluigita de la RPI Kassel. Ĝi formulas la ĝeneralan celon jene: Kapablo starigi la religian demandon en la respektivaj situacioj de decidiĝoj kaj konfliktoj kaj okupiĝante pri la donitaj respondoj de religia tradicio veni al propra respondo. Tiu celo disbranĉiĝas al jenaj superaj celoj: Kapablo je propra religia mond- kaj vivinterpreto (en la individua, interpersona kaj socia kampoj) kaj kapablo je kompetenta uzo de religia tradicio (religiaj nocioj kaj pensomodeloj, dokumentoj de religia tradicio, historia evoluo de religio). Tiuj ĉefaj celoj tre fajne subdividiĝas kaj estas realigataj per konkretaj temoj. Jen laŭplaĉa elekto: fido — malfido (2a klaso), timo kaj kuraĝo (4a klaso), la ĉirkaŭmondo de Jesuo (5a klaso), la estonteco de la familio (10a klaso), militservo kaj rifuzo (12a klaso), religiosociologio (13a klaso), ktp.

Dume la eklezioj prezentas plue temojn tre strikte ligitajn al la propraj intereso kaj eĉ se ili transpaŝas la propre eklezian kadron, ili tamen rekonduku al ĝi. Nenie oni ĝis nun ekz. rezignis pri la konfeso dividita instruado; tiu insisto klare montras, ke la eklezioj plue rigardas la RI kiel eklezian domicilon en la lernejo kaj pli volonte tute foroferus ĝin ol rezigni pri siaj historiaj privilegioj.

Dume la pedagogia situacio postulas solvojn, eĉ drastajn solvojn, ĉar alie la malanoncoj plimultiĝos ankoraŭ. La diritaj ĉefaj celoj de la PTI Kassel ŝajnas momente la sole eblaj. Ĉar en nia kultursfero la kristanismo ludis kaj ankoraŭ ne ĉesis ludi influan rolon, estas necese ekposedi, trarigardi, trakompreni tiun pasintecon, precipe en ĝiaj influoj al nia nun. Aliflanke necesas vastigi la tradician koncepton de religio kaj kompreni ĝiajn fenomenologiajn, sociologiajn kaj teologiajn latentajn: Necesas ekkoni ankaŭ la funkciojn de religio: ĝenerale, ke ĝi helpas al interpreto kaj malŝlosado de vereco; individue, ke ĝi helpas al memtrovo (identeco, memrealigo); socie, ke ĝi samtempe stabilizas kaj maltrankviligas la respektivan socion. Plie necesas koni la ambivalencan efikon de la religio: ĝian politikan ambivalencan: opio de la popolo, sed ankaŭ protesto kontraŭ mizero; sankcio de ekzistantaj regosistemoj kiel diaj, sed ankaŭ celado al ŝanĝo de la politikaj situacioj. La socia ambivalenco esprimiĝas per apogo de la konservativaj fortoj konservante elviviĝintajn tradiciojn, sed ankaŭ per ŝanĝo de la socio helpe de modeloj por pli bona socio. El tio sekvas la ampleksa tasko de religia sistemigo, kiu siavice komprenigos la gravecon konfronti la junan generacion kun tiu multfaceta fenomeno, en kiu la unuopaj kristanaj eklezioj povas esti nur unu el tre multaj elementoj.

Dum la oficiala religiopedagogio hodiaŭ ne plu hezitas defendi, apliki, konkretigi kaj per instrumodeloj realigi tiujn tezojn, la oficialaj eklezioj (precipe la katolika) nur tre heziteme sekvas la pedagogian evoluon.

Ju pli tamen tiuj ideoj estos prezentataj al la teditaj kaj eklezie satnutritaj lernantoj, des pli — mi kredas — tiu fako trovos novajn ŝancojn, ĉar ĝia profunda humaneco ĝis nun apenaŭ sistemiĝis en iu alia instruobjekto. Sed la vojo al tia realigo estos konfliktoplena.

La lerneja instruado de la Internacia Lingvo

Enkonduko en instrumentodon

de

Prof. d-ro István Szerdahelyi, fakestro de „Esperanto lingvo kaj literaturo“

en la universitato Lóránd EÖTVÖS, Budapest

(II-a parto)

La elformiĝo de kapabloj

§ 22 En lingvometodiko estas konataj kvar bazaj kapabloj: la skribo kaj lego, la kompreno kaj parolo.


La parolakto estas siaspece organizita interŝanĝo de informaĵoj. La interŝanĝo de informaĵoj povas okazi en du formoj: skriba kaj buŝa. Tiuj du formoj diferencas per la uzataj de ili signaroj: la skriba formo havas nur spacan, la buŝa — tempan kvanton. Laŭ tio ni diferencigas du informaci-formojn: la grafikan (skribo — lego) kaj la akustikan (parolo — kompreno).

La interŝanĝo de informaĵoj okazas per la uzado de signosistemoj. Sekve, ĝia antaŭkondiĉo estas, ke tiuj, kiuj partoprenas en la interŝanĝo (kaj la informanto kaj la informato) konu la signalsistemon de la koncerna inform-kodo, t. e. en nia kazo la lingvan materialon (vidu la paragrafojn 17—21), alivorte: la tuta signalsistemo devas enesti en la memoro.

Sed la simpla enmemorigo de la materialo ankoraŭ ne sufiĉas: oni devas ĝin uzi dum la informa procezo, t. e. oni devas elformi la kapablon aŭtomate kaj mekanike apliki ĝin en la servo de informoŝanĝo.

Sekve: la transdono kaj akcepto de informaĵoj eblas nur per aŭtomata apliko de la signalsistemo de la koncerna informa kodo.

§ 23 La komunika akto havas ĉiam du polusojn: la informantan kaj informatan.



grafika	skribo	lego
akustika	parolo	kompreno

El la supra skemo estas kompreneble, ke la informanto partoprenas en la komunika akto produktive (t. e. li bezonas produktivajn kapablojn), la informato — receptive (t. e. li devas nur akcepti kaj kompreni la informaĵon).


Inter la produktiveco kaj receptiveco interpoliĝas la reproduktiveco kiel transira didaktika grado de kapablo.

Tiuj gradoj neniam prezentiĝas puraj: ili intermiksiĝas laŭ certaj proporcioj: pli facile ni akiras receptivajn kapablojn ol produktivajn, kaj pli facile reproduktivajn ol produktivajn. Estas konataj fenomenoj, ke oni legas kaj komprenas la legitaĵon aŭ aŭdas kaj komprenas parolon antaŭ ol mem kapabli esprimi memstare siajn pensojn. Same, la lernantoj pli frue kapablas paroli pri la lernolibraj temoj pere de lernolibraj lingvorimedoj ol memstare esprimi sin en simila viva situacio (reproduktiveco).

§ 24 La legado estas adekvata transformo de grafikaj signoj je akustikaj kaj ilia sinkrona percepto.

Oni distingas laŭtan kaj mutan, respektive analitikan kaj sintetikan legadojn. La laŭta kaj analitika legado estas rimed-karaktera, la muta kaj sintetika legado estas cel-karaktera.

La laŭta legado estas unu el la plej valoraj ekzercadformoj. Dum ĝi la okuloj kaptas la grafikajn signojn, kiuj transiras en la aŭdanalizatoron de la cerbo, kie ili akiras sonŝelon. Sinkrone la sonoj eniras la parolmotoran analizatoron, situantan en la kortiko (cerba ŝelo) de kie ili transiras al la muskoloj de la parolorganoj. La psikologia akto dum la **muta legado** estas preskaŭ la sama, nur la akustikaj impresoj estas pli palaj.



§ 25 Dum la **analitika legado** ni klopodas kompreni ĉiun elementon de la legitaĵo aparte kaj detale. Tiucele oni klopodas malkaŝi ĉiujn lingvajn fenomenojn kaj solvi ĉiujn renkontitajn problemojn. Tiel la analitika legado kompletigas kaj ekzercas la lingvajn konojn.

La **sinetika legado** celas ekkoni la informojn de la teksto. Oni preteriras la lingvajn fenomenojn, malatentas la esprim-rimedojn kaj koncentrigas la atenton al la kompreno de la enhavo.

La legokapablo evoluas proporcie kun la pliampleksigo de la lingvokono (fonetiko, gramatiko kaj leksiko). La korelacia koeficiento (citita ĉe Hagboldt) laŭ du malsamaj eksperimentoj estas: inter la leksika kono kaj parolkapablo: 0,82 respektive 0,78; inter gramatika kono kaj parolkapablo: 0,77 respektive 0,65.

Dum la instruprocezo ni uzu ĝenerale la analitikan-sinetikan (miksitan) legadon sed neniam ni forgesu, ke la celo estas alkitimigi la lernantojn iom post iom al la sinetika legado. Pro tio, en la meza kaj supera periodoj ni devas ekzerci la mutan-sinetikan legadon dum la studhoroj, kaj ni devas eduki ilin al la emo intensive legi hejme.

§ 26 La **skribo** estas la inverso de la lego: la lego estas perceptebla kiel deĉifrado, la skribo kiel ĉifrado. Ankaŭ la skribo estas kompleksa psikologia fenomeno: partoprenas ĝin la vidaj kaj kinestezikaj analizatoroj kaj parte la aŭdaj. Ili sendas impulsojn al la kortiko, de tie venas la avizoj al la manoj kaj fingroj. Oni skribas kvazaŭ laŭ ia interna diktado.

La skribakto konsistas el du fazoj: vortkonstruo el literoj kaj informaj-konstruo el vortoj kaj sintagmoj. En metodika plano oni distingas du etapojn: 1. la **skribtekniko**, t. e. la kono de grafika kaj ortografia sistemo de la lingvo por kapabli konstrui el literoj vortojn; 2. la **skribkapablo**, t. e. la kapablo esprimi ĉion skribe, kion oni kapablas esprimi parole.

La **skribtekniko** baziĝas sur la kono de gramemoj: literoj, diakritikaj signoj kaj interpunkciaj signoj. La principa bazo de la skribtekniko estas la rilato inter la sono kaj litero. La instrupostuloj estas:

- a) kaligrafie ĝuste prezenti la grafemojn;
- b) adekvatigi la literojn kaj la sonojn;
- c) koni la ortografiajn regulojn de la lingvo.

La instruado de skribtekniko en Esperanto ne kaŭzas problemojn, ĉar:

- a) estas kvanta adekvateco inter la sono kaj litero (1 litero = 1 sono);

- b) ne estas liter-ononimio kaj liter-sinonimio kiel en aliaj lingvoj: ĉiu litero reprezentas ĉiam la saman sonon kaj inverse (escepte la didaktike neglekteblan sonkonformiĝon kaj asimiladon);
- c) la literoj de Esperanto estas konataj al la lernantoj el la gepatra lingvo (escepte la supersignoj);
- d) la ortografio baziĝas sur la fonetika principo, senescepta, logika.

La instruado de skribtekniko estas rimed-karakteraj kaj servas al la pli rapida kaj pli firma alproprigo de la lingva materialo kaj elformiĝo de aliaj kapabloj. Precipe ĝi helpas la elformiĝon de legokapablo, ĉar ambaŭ kapabloj baziĝas sur similaj psikologiaj procesoj kun inversa vicordo. Tio motivas la samtempan paralelan instruadon de skribtekniko kaj legtekniko — sed la parolo ĉiam devas antaŭi ilin!

La skriba esprimo de la informajo tre similas la parolan: psikologie ĉeestas ĉiuj nervaj cerbaj analizatoroj eĉ pli ol dum la parolo: la vidaj kaj la kinetiko-grafikaj. La skribon komplikas krome la manko de komuna situacio inter la informanto kaj informato. Fine, dum la parolo la informanto povas uzi helprimedojn: geston, mimikon, intonacion.

Alia diferenco inter la skribo kaj parolo estas, ke dum la parolo la penso kaj ĝia esprimo estas sinkronaj, dum la skribo la formulado de la penso antaŭas ĝian esprimon. Malhelpas la elformiĝon de skribkapablo ankaŭ la eblecoj: dum la studhoroj ĝenerale oni ekzercas la parolon kaj nur malofte la skribon. Ĝenerale la skribo estas limigita je hejmtaskoj kaj la tre maloftaj skribaj kontroloj. Pro tio estas tre grave, ĉiam konscie korekti la hejmajn laboraĵojn kaj alkitimigi la lernantojn al la korespondado. Ĝi estas la plej taŭga formo por elformi en la lernantoj la skribkapablon.


§ 27 La akustika formo de la komunika akto estas **la parolo kaj la kompreno**. Dum la parolo la plej gravan rolon ludas la artikulacia aparato kaj la aŭdo partoprenas ĝin nur pasive. Dum la kompreno inverse, sed ankaŭ dum la kompreno partoprenas la artikulacia aparato kiel interna parolo. Kiam ni aŭskultas parolon de iu, unue ni analizas la aŭditaĵojn, poste ni sintezigas ilin transponante jam en alian kodon. Parolante, ni elektas el la ekzistanta materialo la necesajn elementojn kaj unuigas ilin en parolunuon. En ambaŭ kazoj helpas la logika kaj mekanika memoro. En la kompreno aktivan rolon ludas la ekkono de la lingva materialo, en la parolo — ĝia esprimo.

Laŭ la moderna koncepto la parolo de lernata lingvo ĉeestas dum la tuta instruprocezo: ĝi estas kaj la rimedo kaj la celo de la instruado. En nia kazo tiun principon oni povas esprimi jene: „Instrui Esperanton per Esperanto!“

La parolo havas du formojn: la **dialogo** kaj la **monologo**. La dialogo estas (konsekvenca) ĉeno de demandoj kaj respondoj, kiuj generiĝas unu el la alia (la posta el la antaŭa) dum la senpera interkomunikado de du aŭ pli personoj.

Monologo estas la parolo de unu persono, kiu disvolvas siajn pensojn, opinion, pritakson ktp. pli aŭ malpli detale.

La ciklo de la komunika akto aspektas jene:



La ŝanĝo de informaĵoj sekvas la vicon: $A \rightarrow B \rightarrow C_1 \rightarrow A_1$
 $\rightarrow B_1 \rightarrow C \rightarrow A$.

La interrilato de la kompreno kaj parolo estas evidenta. Sed ne estas tute evidenta en la metodiko la demando de la receptiva ekzercado kaj instruado. Oni ne forgesu, ke la receptiveco havas ĉiam pli vastan lingvan kampon ol la reproduktiveco aŭ produktiveco: ni ne povas influi la informanton kaj devigi lin, ke li elektu dum la parolo nur lingvajn elementojn, konatajn de ni. Aliflanke la percepto kaj la kompreno estas psika fenomeno, bezonanta certan tempon. Fizike la parolo estas senintermita ĉeno de aerosciloj. La sonondoĵoj sekvantaj unu la alian transdonas informaĵojn. Dum la percepto kaj observado de la parolo ni deseriĝas la sonkontinuon je elementoj, ni rekonas ilin, ni identigas ilin kun la posedataj modeloj, kaj al la identigitaj signaloj aliĝas la adekvataj signifoj, kiuj reprezentas iun eron al la realaĵo. Tiu procezo okazas dum certa tempo, kaj dume ni devas konservi la opajn erojn ĝis finiĝas la tuta komunikaĵo. Sed la kapabloj de la homa cerbo estas limigitaj kaj esprimeblaj (tamen ne tute precize pro la subjektivaj faktoroj de la informato): esprimata en la mezurunuo de la informaĵoj: bito, ni povas 10 sekundojn konservi la ricevitan 160-bitan informaĵon. Tion oni povas atingi, se la instruisto priatentas la ritmon de sia parolo (normala parolo estas 80—90 vortoj po minuto; meza: 100 vortoj po minuto, rapida: 140—150 vortoj po minuto).

La instruado de la parolo okazas laŭ la sekva vico: reproduktiva parolo laŭ la lernolibra materialo — normaligita parolo de la instruisto (t. e. „klaslingvo“) — produktiva parolo en ne preparitaj kaj ne ekzercitaj vivsituaĵoj.

La lerneja praktiko

La antaŭpreparo de la eduk-instrua laboro

§ 28 La instruprogramo (aŭ instruprojekto) estas la baza dokumento de la instruado de iu studobjekto. Ĝin eldonas ia supera instanco (ĝenerale la ministerio) kaj enhavas: la instrumaterialon kaj la postulojn.

Por la Esperanto-instruado en la hungaraj lernejoj la ministerio ĝis nun ne eldonis instruprojekton. Laŭ la skemo de aliaj lingvoj ni montras ĉi sube ekzemplon, kompilitan laŭ la lernolibro E/1/:

I. Lernoĵaro

(2 studhoroj ĉiusemajne, entute 66 studhoroj)

Leksiko

500 leksikaj elementoj. Krom tio 5—10 % maloftaj vortoj kaj esprimoj troviĝantaj en originalaj tekstoj, receptive.

La tematiko de la leksika materialo

La temoj de la ĉiutaga vivo:

- La lernejo kaj la lerneja ĉirkaŭaĵo;
- la hejmo kaj la familio;
- la homa korpo: sano, malsano, sporto;
- la urbo: strato, surstrata trafiko; aĉetado;
- la vilaĝo kaj terkulturo;
- la naturo: bestoj kaj plantoj; ekskursoj;
- la tempo kaj la vetero; la kalendaro.

Gramatiko

-O, -N, -J, -A, pli, plej; -E; -AS, -IS, -OS, -US, -U, -I;
 Personaj pronomoj, senpersona pronomo, posedaj pronomoj;
 Tabelvortoj; numeraloj.
 Esti, havi, voli, povi; jesado-neado; demandoj: Ĉu?

Prepozicioj:

en, sur, de, ĝis, al; per, kun, sen, ĉirkaŭ, super, sub, antaŭ, inter, apud, ĉe, el, post, pri, dum, krom, trans, tra, pro, por;

Afiksoj:

-IN, -IST, -ANT, -EJ; MAL-, EK-, GE-, -IG-, -IG-, -AD-; BO-, -AN-, -ET-, -EG-, -ER-, RE-, -IL-, -AJ-, -UJ-.

La plej necesaj radikvortoj:

primitivaj adverboj, konjunkcioj, subjunkcioj, partikuloj.

Postuloj**Parolo:** La lernanto kapablu en la kadro de lernitaj temoj:

- kompreni simplan Esperanto-parolon, kiu baziĝas sur konataj vortoj;
- iniciati aŭ partopreni facilajn konversaciojn;
- priskribi simplajn bildojn; konstrui al ili demandojn kaj respondi al ili;
- rakonti la enhavon de la legita teksto; kompili al la teksto planon, demandojn kaj respondi al ili.

Legado, tradukado: La lernanto kapablu:

- legi senerare kaj esprimplene legaĵojn, enhavantajn nur konatajn vortojn;
- traduki mallongajn mezfacilajn tekstojn, enhavantajn kelkajn nekonatajn vortojn per la helpo de vortaro en kaj el Esperanto.

Skribado, konceptado: La lernanto kapablu:

- kaligrafie senerare, klare skribi Esperantajn tekstojn;
- laŭ diktado skribi facilajn tekstojn, baziĝantajn sur konataj vortoj;
- kompili la enhavon de la legaĵo;
- el la lernitaj temoj skribi kelkajn memstarajn frazojn;
- per la helpo de vortaro kompili mallongajn leterojn.

Skribaj kontrollaboraĵoj:

Dum la lernoĵaro oni devas skribi 3 skribajn kontrollaboraĵojn.

§ 29 La instruprograme kaj la aldonitaj „minimumoj“, kiuj plikonkretigas la instrumaterialon estas la bazaj dokumentoj de la lernolibro. Samtempe ĉiu instruisto antaŭ ol komenci la kompiladon de la **instruplano** devas precize kaj detale koni la instruprojekton. La dua paŝo post la kono de la instruprojekto estas la kono de la **lernolibro**. La instruisto devas detale kaj profunde studi la lernolibron, uzotan fare de li dum la sekva lernoĵaro. Samtempe li observas kaj la materialon de la lernolibro kaj ĝian metodon. Nur kiam li senmanke konas la instruprojekton kaj la lernolibron, li povas plani sian laboron, t. e. konstrui sian **instruplanon**.

La instruplano estas presita blanketo, disdonita fare de la lernejo. La limdato de la instruplano estas ĝenerale la 15-a de septembro. Ĉiu instruisto preparu la instruplanon en du ekzempleroj: unu ekzempleron ricevas la direktoro, kiu surbaze de la instruplano kontrolas la laŭplanan instruadon, la alia ekzemplero restas al la instruisto por ĉiutaga uzado.

La oficiala formularo de instruplano en hungaraj lernejoj:

instrumonato kaj — semajno	instruhoro	la materialo de la instruhoro	anticipaj kaj postaj rimarkoj, spertoj rilate al la materialo kaj metodo de la instruhoro
1	2	3	4

La metodiko de la planado

La fiksj parametroj, laŭ kiuj oni planas, estas: la disponebla tempo (t. e. la nombro de la studhoroj) kaj la nombro de la lecionoj.

Ekzemple en hungaraj lernejoj oni instruas Esperanton dum 2 horoj semajne laŭ la lernolibro E/1—12 lecionojn kiel fakultativan objekton. La instruado de fakultativaj objektoj komenciĝas ĝenerale la 1-an de oktobro. La normala lernojaro (komenciĝanta la 1-an de septembro) enhavas 33 instrusemajnojn, sekve la fakultativa studobjekto disponas pri 29 instrusemajnoj, kiuj egalas 58 instruhorojn. El tiuj 58 instruhoroj bezonas la kontrol-laboraĵoj kaj ilia korektado $3 \times 2 = 6$ instruhorojn kaj 2 instruhorojn la duonjara ripetado (la jarfina okazas pere de la 12-a leciono). Restas 50 instruhoroj por la 12 lecionoj. El ili 2 instruhoroj por la enkonduka leciono, la resto $48 : 12 = 4$ studhoroj por unu leciono. (Rimarko: Ne ĉiuj lecionoj estas egalaj, kelkaj bezonas pli, la aliaj malpli da instruhoroj. La instruisto ne devas forgesi pri tio dum la planado!)

Post tia disdivido li faras la unuan skizon de plano, kiu povas aspekti jene:

(Unua lernojaro, laŭ E/1)

I/1	1	Enkonduka leciono
	2	Enkonduka leciono
/2	3	I-a leciono/A
	4	I-a leciono/A
/3	5	I-a leciono/B
	6	I-a leciono/B
/4	7	II-a leciono/A
	8	II-a leciono/A
II/5	9	II-a leciono/B
	10	II-a leciono/B
/6	11	III-a leciono/A
	12	III-a leciono/B
/7	13	III-a leciono/B
	14	III-a leciono/B
/8	15	Ripetado de I-III lecionoj
	16	Unua kontrollaboraĵo
/9	17	Korektado de la I-a kontrollaboraĵo
...	...	kaj tiel plu

La dua fazo estas la kompletigo de la plano per detaloj. Ekzemple:

I/1	1	Enkonduka leciono/A Nacilingva enkonduka parolo pri Zamenhof kaj Esperanto. La unuaj vortoj; literoj, sonoj, akcentado; Gramatiko: 1 § a, b; 2 §, 3 §, 4§.	Portreto de Zamenhof; Teo, kafo, sukero; Bildlibro pri bestoj; Mondmapo kun la kontinentoj.
		Nia lernolibro de Esperanto; (ĝia uzado) la bezonataj lerniloj (kajeroj, ktp.)	
I/1	2	Enkonduka leciono/B Leksiko: kune kun la antaŭaj 34 vortoj; Gramatiko: -O, -A, LA, ESTAS 5 §, 8/a §, 24 §, 35/a §.	La demonstrilojn vidu en la supra studhoru! LA ... O ESTAS ... O. LA ... O ESTAS ... A. Ekzercoj de legado, skribado kaj tradukado.

La instruplano estas la gvidilo de la instruisto, ĝi devas esti ĉiam ĉe-mane. La instruplano devas kongrui kun la klasjurnalo. Post la studhoru la instruisto faru rimarkojn en la kolono no. 4 pri siaj dumhoraj spertoj (pri la amplekso de la materialo, pri la demonstrado, metodo ktp.).

§ 30 Post la planado de la tutjara laboro komenciĝas la ĉiutaga agado de la instruisto: **la instruhoroj**. Neniu instruisto rajtas eniri la klasĉambron sen antaŭa konscienca preparo! Li devas antaŭe kvazaŭ pense sekvi ĝis la fino la verŝajnan disvolviĝon de la instruhoru neforgesante, ke ĉiu instruhoru povas nin surprizi per neatenditaj okazontaĵoj. La instruisto devas detale, senmanke kaj profunde koni la instruotan materialon kaj ankaŭ la manieron, laŭ kiu li transdonos ĝin al la lernantoj; li devas antaŭvidi la situaciojn kaj antaŭprepari ĉiun apartan instruieron de la horu. Klopodu ĉiu instruisto, ke la instruhoru estu kvazaŭ eta didaktika artverko, kaj post la studhoru ĉiu lernantu estu pli riĉa je konoj kaj kapabloj ol li estis antaŭ la studhoru!

La didaktika kaj pedagogia celoj de la instruado de Esperantu realiĝas kaj efektiviĝas dum la sinsekva kaj konsekvenca ĉeno de instruhoroj. La dokumento de la instruhoru estas la **horskizo**, kiu samtempe dokumentas la antaŭpreparan laboron de la instruisto. La horskizon la instruisto kompilas por si mem kaj ne por la direktoro aŭ inspektoro (kvankam la direktoroj kaj inspektoroj ĝenerale petas la horskizojn por konvinkiĝi pri la antaŭprepara laboro de la instruisto). Gravas ne la formo, sed la enhavo de la skizo. La horskizo enhavu ĉiujn detalojn, kiujn bezonas la instruisto por gvidi la studhoron. La komencanta instruisto ne hontu teni en manoj la horskizon, post kelkaj jaroj li ne plu bezonos ĝin dum la instruhoru. La horskizo detaligas la instrumaterialon laŭ la didaktikaj eroj en kronologia vico, t. e. kiel ili sekvas unu post alia dum la instruhoru. Sekve tiu vico dependas de la **tipo de instruhoru**.

La tipo dependas de la efektivigendaj didaktikaj celoj: se dum la instruhoru efektiviĝas akcentite nur unu didaktika celo, temas pri **specialaj** instruhoroj, se efektiviĝas kelkaj didaktikaj celoj, la instruhoru nomiĝas **miksa**. 80 % de la tutjaraj instruhoroj estas miksa.

§ 31 La specialaj instruhoroj estas:

1. instruhoru de nova materialo
2. ekzerca instruhoru

3. instruoro de ripetado
4. kontrola instruoro (parola aŭ skriba).

La ĝenerala skemo de la specialaj instruoroj estas:

ORGANIZADO 2—4 min.	SPECIALA CELO (1.—4.) 35—38 min.	DESIGNADO de HEJMTASKO 3—5 min.
------------------------	-------------------------------------	------------------------------------

1. Instruoro de nova materialo

La centran lokon okupas la klarigo kaj ekzercado de la nova materialo. Tia-tipa instruoro estas bezonata, se la materialo (ĝenerale gramatik-karakterata) estas pli ampleksa kaj pli komplika ol la kutimaj.

2. Ekzerca instruoro

Dum la ekzerca instruoro ne okazas transdono de nova materialo, dum la tuta studoro oni ekzercas la gelernantojn kaj sistemigas la materialon de unu aŭ kelkaj unuoj. La celo de ekzercaj studoroj estas la aŭtomatigo kaj plifirmigo de kapabloj. Paralele oni uzas kontrolon, t. e. oni taksas la partoprenon de la lernantoj en la ekzerca laboro.

3. Instruoro de ripetado

La ripetado ludas gravegan rolon en la instruado de Esperanto. Oni devas nepre organizi almenaŭ 3 detalajn ripetadojn (po 2 instruoroj): en la komenco de la lernojar, duonjare kaj jarfine. La ripetado samtempe estas ekzercado kaj kontrolo kaj ĉefe: sistemo de pli ampleksa dozo de instrumaterialo.






4. Instruoro de kontrolo

La instruisto devas havi konstante informojn pri scio, kono kaj kapablo de la lernantoj; ĉi tio estas la spegulo de lia laboro. La kontrolo informas la instruistojn pri la virtoj kaj mankoj de ilia instrulaboro. Kia ajn estu la instruoro, la kontrolo ne povas manki.

La kontrolo devas esti daŭra, senintermita kaj ĝenerala; la instruisto devas koni la evoluon de opaj lernantoj kaj ĝenerale de la tuta grupo, la individuajn kaj komunajn erarojn diferencigite laŭ konoj kaj kapabloj. Mem la lernantoj pretendas la kontrolon; ankaŭ ili volas koni la rezulton aŭ fiaskon de sia laboro. La laŭdo kaj bona noto admonas, la korekto kaj atentigo helpas la lernantojn. Sed la kontrolo devas esti ĉiam komuna laboro, samtempe ekzercado.

De tempo al tempo la instruisto bezonas pli ĝeneralan bildon pri la sukceso de la lernantoj. La plej taŭga formo estas la skriba kontrolo: oni povas skribigi rapidajn, mallongajn laboraĵojn kaj en aparta kajero la t. n. kontrolajn laboraĵojn (dum 2-hora instruado 3, dum 3-hora 4 kontrolajn laboraĵojn dum la lernojar). La kontrollaboraĵojn ĝenerale antaŭas instruoro de ripetado. La skribaj kontrollaboraĵoj havas konstantan formon: 2,5 cm marĝeno, super la duobla linio oni ne skribas, sub ĝi per romiaj ciferoj oni signas la numeron de la laboraĵo, poste la titolon, la taskon kaj la solvon. Oni skribas nur sur unu flankon de la paĝo, la alia restas pura por la korektaĵoj. La temo devas esti konvena al la instrumaterialo de la koncerna etapo, ekzemple oni diktas demandojn, la tasko estos, respondi al demandoj; oni diktas indikajn frazojn, la tasko estos, konstrui demandojn al la substrekitaj frazelementoj, kompletigi mankajn frazojn, pli poste skribi la resumon de legita teksto, priskribi bildon aŭ iun situacion aŭ eventon, kompili leteron, fine la tradukaĵoj, precipe el la gepatra lingvo Esperanten por kontroli la gramatikan kaj leksikan konojn de la lernanto.

Tuj post la skribado la instruisto korektu la laboraĵojn. Dum la korektado oni uzas la sekvajn signojn:

	litereraro
	vorteraro
	gramatika eraro
	mankas litero aŭ vorto
	konfuza, malklara frazo
3 1 2	ĝustigo de la vortordo

Estas konsilinde unue korekti ĉiujn laboraĵojn, poste konstati la vicordon laŭ la valoro de la laboraĵoj kaj proporcie klasifiki ilin.

La korektado kaj la klasifikado estas malfacilaj laboroj: pretendas precizecon kaj konsciencon. En la laboraĵoj ne povas resti nekorektita eraro!

Por la korektado de kontrollaboraĵoj oni devas dediĉi apartan studhoron.

La instruisto devas konstrui post la korektado la „mapon“ de la eraroj: li devas konstati, kiuj estas la ĝeneralaj eraroj kaj kiuj partikularaj kaj serĉi ilian kaŭzon. Antaŭ ol disdoni la kajaĵojn li devas konigi al la klaso la ĝeneralajn erarojn kaj ekzerci ilin en ĝusta formo ĝis li konvinkiĝas, ke la klaso ne plu ripetos tiujn erarojn. La partikularajn erarojn li notu por si mem, kaj, de tempo al tempo li kontrolu, ĉu la lernanto jam evitas tiun eraron. Post la disdono de la kajaĵoj ĉiuj lernantoj devas korekti „spegulbilde“ siajn erarojn. Poste ili transkribas la erarojn en la laborkaĵojn kaj hejme ekzercas sin en la uzado de la ĝusta formo.

La kajaĵoj de kontrollaboraĵoj devas esti gardataj en la lernejo, 5 jarojn ili ne estas selekteblaj.

§ 32 La miksaĵaj studhoroj

Kvankam en la antaŭa paragrafo ni parolis pri specialaj studhoroj, ni povis konvinkiĝi, ke tute specialaj (t. e. „unucelaj“) studhoroj puraj ne ekzistas; al la ĉefa celo ĉiam aldoniĝas akcesore iu dua: ekz., ekzerco-kontrolo kaj inverse, nova materialo kaj ekzerco. Dum la miksa studhoroj egalvalore ĉeestas diversaj instruceloj, nome ĉiuj, pri kiuj temis la antaŭa paragrafo: kontrolo, nova materialo, ekzercado kaj ripetado. Ili miksiĝas proporcie dum la studhoroj laŭ la intencoj de la instruisto observanta la principon: la plej grava ero de ĉiu studhoroj devas esti ĉiam la ekzercado! La kutima skemo de miksa studhoroj estas:

1. Organizado de la studhoroj
2. Kontrolo: hejmaj taskoj — skribaj
 - parolaj: frontalaj
 - individuaĵ
3. Enkonduko de nova materialo — konversacio
4. Antaŭekzercado de la nova materialo
5. Legado kaj legajellaborado
6. Postekzercado kaj aktualigo
7. Resumo kaj designado de hejmaj taskoj: parola skriba

1. Organizado de la studhoroj

- a) La klaso stare atendas la envenantan instruiston. Irante al la katedro, la instruisto jetas rigardon sur la nigran tabulon; ĝi devas esti ĉiam pura, kun antaŭpreparita spongo, kreto, kolorkretoj kaj la aliaj instruhelpiloj. Starante la instruisto salutas la klason: „Bonan matenon!“ („Bonan tagon“) — la klaso resalutas „ĥore“. Sekvas

la raporto de la dejoranto: „Sinjoro instruisto, mi raportas al vi, ke en nia Esperanto-grupo ĉeestas . . . lernantoj, forestas . . . lernantoj, laŭnome: . . .” La instruisto dankas la raportinton kaj permesas al la lernantoj sidiĝi. Li enskribas en la klaslibron la numeron de la studhoru, la materialon kaj la forestantojn. (La dejoranto devas surskribi sur la nigran tabulon la daton kaj la numeron de la studhoru.) La organizado ne povas daŭri pli ol 4 minutojn.

2. Kontrolo

a) Kontrolo de skribaj hejmtaskoj

Ne estu horo sen skriba hejmtasko. La skriba hejmtasko estu la ripetado de la nova materialo kaj ĝia praktika apliko. Ĝi ne estu tro malfacila kaj tro ampleksa: en la komenca periodo ne pli ol 3—5 mallongaj frazoj. Unu el la lernantoj laŭlegas aŭ skribas sur la tabulon la frazon. Ni alkiutimigu niajn lernantojn al tuja komparo de iliaj frazoj kun la surskribitaj, kaj se ili konstatas diferencon, al tuja anoncado levante la manojn. Tiel la instruisto tuj rimarkas, kies solvo estas ĝusta aŭ ne. La erarojn ni klarigu, kaj ĉiu lernanto korektu per ruĝa krajono sian eraron. La lernanto ne kopias el sia kajero la frazon. Lia kajero estas ĉe la instruisto, kiu dume kontrolas la kajeron, kaj la lernanto solvas la taskon ĉe la tabulo. Ekz.: se la tasko estis, respondi al la demando, unu el la lernantoj legas la demandon, la vokita lernanto respondas ĝin skribe, kaj dume la instruisto korektas lian kajeron. Ni estu pretendemaj kaj je formo kaj je enhavo koncerne la kajerojn de niaj lernantoj. Dum la unua studhoru ni komuniku la formon de kajerlaboro (marĝeno, titolo, dato, ktp.), kaj ni estu konsekvencaj!

b) Prirespondigo frontala kaj individua

Nuntempe la prirespondigo ĝenerale okazas frontale, en formo de konversacio. Dum tiu konversacio ĉe kelkaj lernantoj (kies nomojn la instruisto povas menciigi en la horskizo antaŭ la studhoru) la instruisto haltas pli longe kaj pli detale por paroligi ilin. Post tiu kontrolo konversacio la instruisto pritaksu la laboron kaj klasifiku almenaŭ 4—5 lernantojn.*

§ 33 La **enkonduko de la nova materialo** okazas en konversacia formo: La instruisto gvidas tiel la konversacion, ke dume aperu la novaj elementoj (kaj leksikaj, kaj gramatikaj), kiujn li intencas enkonduki. La lernolibroj E/1 kaj E/2 konkrete helpas tiun laboron per la enkondukaj ekzercoj, situantaj antaŭ preskaŭ ĉiu leciono.

Dum la **demandado** la instruisto devas observi la sekvajn principojn:

- a) demandu ĉiam la tutan klason, kaj nur poste alvoku iun;
- b) demandu kaj la bonajn, kaj la malbonajn lernantojn: la respondoj de bonaj lernantoj estas modelaj. Sed ankaŭ la malbonaj rajtas kaj devas partopreni en la konversacio. Alvoku ne nur tiujn, kiuj prezentiĝas!
- c) la demando estu konkreta, klara kaj tuj komprenebla. Ĝi veku la intereson de la tuta klaso;
- d) la demando estu informdona.

En la komenca periodo ni ne havas eblecon meti tiajn demandojn pro la manko de lingva materialo. En tiu periodo ĝenerale estas uzataj „ekzercaj demandoj”, ekz. „Kia estas la kreto?” (La lernanto ja scias, ke ankaŭ la demandinto scias tion, do, la demando ne havas valoron el la vidpunkto de la informajo, nur el lingva-ekzerca vidpunkto. Tion ni ĝenerale ne demandas en la ĉiutaga vivo. — La demando: „Kie laboras via patro?” estas jam informdona, ĉar la instruisto ne scias, kie laboras la patro de la demandito, do, la interesiĝo estas natura!)

Oni uzas ĝenerale en la komenca periodo mallongajn, specialajn kaj alternativajn demandojn. La **specialaj demandoj** komenciĝas per K- komenca tabelpronomo kaj la demandito devas ion aldoni al la demanda frazo. Ekz.: „Kion faros vi dimanĉe?” — „Dimanĉe mi

* La klasifikaj (notoj) estas: 5 = bonega, 4 = bona, 3 = meza, 2 = kontentiga, 1 = nekontentiga

ripozos". Estas la alternativa demando (komenciĝanta per ĈU?), la respondo simple ripetas parton de la demando. „Ĉu dimanĉe estas ripoztago? — Jes, . . .“ La didaktika valoro de specialaj demandoj estas pli alta, sed ankaŭ la alternativaj demandoj helpas la aŭtomatigon de lingva materialo.

La respondoj estas lakonaj, mallongaj, kompletaj kaj kompletigitaj.

Ĉu Esperanto estas facila?	Lakona respondo:	Jes.
	Mallonga respondo:	Jes, ĝi estas facila.
	Kompleta respondo:	Jes, Esperanto estas facila lingvo.
	Kompletigita respondo:	Jes, Esperanto estas ne nur facila, sed ankaŭ belsona lingvo.

En la pli postaj periodoj, por alkitimigi la lernantojn al la kompreno de pli longaj demandoj, oni povas kompletigi ankaŭ la demandojn per kutimaj parolturnoj, ekz.:

Bonvolu al mi diri . . .
Kiu povas diri al mi . . .
Mi estus tre dankema, se iu el vi . . .

Tiu formo de prezento de la materialo estas samtempe ankaŭ la unua de ĝia ekzercado Dum la prezento kaj la unua ekzercado oni uzu abunde aŭdo-vidajn instruhelpilojn (Vidu la 38-an paragrafon).

§ 34 La legaĵoj kaj legajellaborado

La legaĵoj, kiel kompaktaj tekstoj, sistemigas la prezentitan kaj antaŭekzercitan materialon, servas kiel bazo de posta ekzercado kaj aktualigo, donas modelon de ĝusta stilo kaj aplikado de la lernita lingva materialo.

Ĝenerale ĝis tiu momento, kiam komenciĝas la legado, la lernolibroj estas fermitaj.

La demonstra-legado: en la komenca periodo unue legu la instruisto, kaj la lernantoj sekvu per okuloj la tekston en la lernolibroj. Dum la demonstra legado la instruisto staru aŭ sidu (nepre ne promenu); ne rapidu (sed ne tro malrapide kaj ne ripetadu); la tonmodulado estu simpla, klara kaj esprimplena, la voĉforto mez-laŭta.

Post la instruisto povas legi la tuta klaso ĥore aŭ lernantoj individue po unu alineo.

En la plipostaj periodoj povas demonstri la legadon ankaŭ la lernantoj, sed nur se la teksto de la legaĵo estis antaŭpreparita dum la antaŭekzercoj. La legado multe plifaciliĝas kaj plisimpliĝas, se la lernantoj konas la aŭdo-motorajn korpojn de la legendaj vortoj. Tekston, enhavantan nekonatajn vortojn oni povas legi nur en la meza periodo de la instruado. En tiu periodo oni devas eĉ legi neantaŭpreparitajn tekstojn kaj iom post iom alkitimigi la lernantojn kompreni ankaŭ la antaŭe ne analizitajn tekstojn. (La antaŭpreparo povas konigi nur la novajn elementojn de la legotaĵo: la novan leksikon kaj gramatikon, sed nenio kaze malkaŝi la eventon de la legotaĵo!) La komprenon de la neantaŭpreparitaj tekstoj helpas la t. n. „orientiloj“: la orientiloj estas tiuj elementoj en la teksto, kiuj unuavide helpas rekonigi la strukturon. Tiaj estas ekz.: la verbo ESTI, la finaĵoj -O, -ON, -OJN, -A, -AN, ktp. Relativaj orientiloj estas: la pronomoj, prepozicioj, konjunkcioj kaj subjunkcioj kaj la afiksoj. Ni alkitimigu dekomence la lernantojn, ke ili klopodu kompreni tion, kion ili legas (— ĝenerale la lernantoj kutimas priatenti nur la teknikon de la legado kaj eĉ ne klopodas kompreni la tekston).

La plej bona prezentado de nova legaĵo estas: aŭskulti surbendigitan tekston de la legaĵo, legita de modele parolanta, elstara pedagogo.

Formoj de legajellaboradoj:

- meti demandojn al la teksto;
- kompili la planon de la teksto;
- titoligi la opajn partojn (alineojn);
- elekti el la teksto la frazojn, karakterizantajn la personojn;

- e) dramigo: se la legaĵo estas dialog-forma, oni disdonu la rolojn. La kunligan tekston legu iu tria lernanto.
- f) surscenigo: la lernantoj ludas la rolojn de la agantaj personoj el la legaĵo;
- g) aktualigo: transformado de la legaĵa situacio en la ĉiutagan situacion de la lernanto;
- h) transformado kaj kompletigo: oni povas transmeti la eventon en la preteriton aŭ futuron; elpensi la antaŭ-okazintaĵon kaj la sekvon de la rakonto ktp.

La traduko ne estas ekzercadformo. Oni tradukigu nur tiam, se la instruisto ne estas konvinkita pri la senmanka kompreno de la teksto. Sekve, la traduko estas unu el la formoj de la kontrolo. Sed, antaŭ ol tradukigi, ni devas elĉerpi ĉiujn aliajn ekzerco-tipojn, kontroleblecojn.

En la mezaj kaj superaj kursoj aperas la ampleksaj, nepreparitaj tekstoj. Dum ilia ellaborado ni devas nepre instrui al niaj ĝelernantoj la uzadon de vortaroj. (La ĝenerala eraro de la lernantoj ĉi-koncerne estas, ke ili senkritike transprenas la unuan signifon de la vorto — ne observante la sintagmon!)

La dumhora vortara laboro kutime konsistas el tio, ke la instruisto surskribas la prezentiĝantajn novajn vortojn sur la tabulon, kaj la lernantoj kopias ilin en siajn vortar-kajerojn. En la postaj periodoj la lernantoj povas memstare prepari la tekstojn. En tiaj kazoj estas konsilinde, skribi en vortarkajerojn ne nur la izolitan vorton, sed, unue la frazon aŭ almenaŭ la sintagmon, en kiu la nova vorto troviĝas en la teksto, kaj poste la izolitan vorton. Ekde la meza periodo oni povas jam difini, ĉirkaŭskribi aŭ alimaniere priskribi la sencon de la vorto, aldoninte ĉiam ankaŭ la gepatro-lingvan tradukon. Ekde la meza periodo oni devas instrui al la lernantoj ankaŭ la vortaruzon, aranĝi kelkfoje en la klaso konkursojn pri la plej rapida kaj plej ĝusta vortaruzo.

Ni devas alkitimigi niajn lernantojn al la abunda hejma legado. Oni povas legigi la lernantojn je lernolibraj tekstoj (ekz.: en la klaso oni ellaboras la tekston ĝis ĝia plej interesa parto, la sekvan parton oni designas por hejma legaĵo), sed ankaŭ je ĵurnaloj („Nia voĉeto“, „Planteto“ ktp.). La legitaĵojn poste la lernantoj prezentas al la klaso en formo de raportaĵo, recenzo, referaĵo ktp.

§ 35 **La ekzercado** estu ĉiam kompleksa, t. e. leksika-gramatika aŭ gramatika-leksika. Tion postulas ankaŭ la baza principo de la lingvoinstruado: instrui lingvon per lingvo en sia funkcio! La baza ekzercadunuo estu ĉiam la frazo! Kaj la gramatikon kaj la leksikon ni devas konsciigi al la lernantoj en frazoj. La „skeleto“ de la frazo evoluas: de la komencaj, simplaj fraztipoj al pli kompleksaj. Sed ĉiu frazo en si mem estas prototipo de senfina ĉeno de samstrukturaj frazoj. Plej oportune ni povas preterlasi la instruadon de gramatika-teorio, se ni prezentas kaj ekzercas la materialon laŭ frazstrukturoj.

Ekz. la sekvaj frazoj estas samstrukturaj:
 En la ĝardeno estas multaj floroj.
 En la klaso lernas diligentaj knaboj.
 En la urbo konstruiĝas modernaj domoj.

La frazstrukturo estas:
 EN LA ... -O ... AS ... AJ ... -OJ.

La frazmodelo estas:
 Pr + S + V_p + A_m + S_m (prepozicio, substantivo, verbo, adjektivo, substantivo)

La strukturismaj ekzercadformoj (didaktikaj operacioj):

- a) simpla anstataŭigo:
 - La libro de la lernanto estas bona.
 - La ... de la lernanto estas bona. (voĉo, kajero, konduto, prononco, noto) ...
 - La libro de la ... estas bona. (patro, instruisto, amiko ...)
 - La libro de la lernanto estas ... (bela, interesa, nova, ...)
 - seria anstataŭigo:
 - Somere ĉiu ... -as ripozi. (povas, deziras, volas, intencas, esperas ...)

- b) Transformado:
de indika frazo en demandan, ordonan, deziran, nean;
Transformado de tempo, persono, nombro, ktp.
Ekz.:
Li lernas diligente. Li lernu diligente! Bonvolu lerni diligente! Li ne lernas diligente.
Ho, se li nur lernus diligente! Li lernis diligente. Ĉu li lernas diligente? ktp.
- c) Integrado: kuntirado de du frazoj en unu.
Ekz.:
Jen kostumo. Jen mia amiko.
Jen la kostumo de mia amiko.
Li promenas. Li legas. — Li legas promenante.
- d) Reduktado: plisimpligo de la strukturo.
Ekz.:
Mia patro laboras en la fabriko. = Li laboras tie.
- e) Ekspansio — plivastigo, plietendo de la strukturo:
Ekz.:
Li laboras . . . kie, kiam, kiel, kun kiu, de kiam ĝis kiam, ktp.
Alia formo de la ekspansio (laŭ diversaj niveloj):

La knabo	skribas.
	leteron.
	volas skribi leteron.
	estas skribanta leteron.
	skribanta leteron, estas en la ĉambro.

Kaj la instruisto kaj la lernanto devas al kutimiĝi al tiu ekzercadformo: malkaŝi la strukturon, alproprigi la modelon kaj la kapablon variigi ilin.

§ 36 La strukturismaj ekzercoj ebligas: la aŭtomatigon de la lernita materialo, la produktivigon de la receptiva-reproduktiva materialo kaj pretigas ĝin al la praktika uzebleco en la ĉiutaga vivo.

La dua grava principo, kiun oni devas priatenti dum la postekzercadoj estas: la praktika uzo de la lernita materialo. Tio signifas, ke oni devas „eliri el la lernolibro“ kaj transponi la materialon en la ĉiutagan vivon de la lernantoj. Atingi tion oni povas nur, se en la klaso regas vere Esperant-lingva atmosfero. Realigi tion, krei spritajn, naturajn, vivajn situaciojn — jen estas la plej malfacila tasko de la instruisto. (Unu el la rimedoj por krei Esperant-lingvan atmosferon estas la konsekvenca uzo de Esperantlingvaj organizaj esprimoj jam ekde la unua studhoru, eĉ se tio estas ekster la lernata aŭ lernita materialo. Iom post iom la lernantoj komprenos ilin kaj sentos ilin tute naturajn. Ekz.: Kiu forestas? Venu al la tabulo! Fermu la librojn! ktp.)

§ 37 Parolante pri la ekzercad-formoj ĝis nun temis nur pri parolaj ekzercoj. Generale la **skribaj ekzercoj** okupas nur duan lokon post la parolaj, sed estus eraro tute ne ekzerci la produktivan skribon. En la nuna praktiko la skribado ĝenerale servas nur kiel formo de kontrolo (ankaŭ la hejmaj skribaj taskoj estas plie kontrolkarakteraj ol ekzercaj). Sed ni devas elformi ankaŭ la skribkapablojn! Kaj elformi iun kapablon oni povas nur per la samspeca ekzercado: parolkapablon per parolo, skribkapablon per skribo. Ekz. skribi planon de iu legita teksto, aŭ fari demandaron al la teksto, tion oni povas ne nur hejme sed ankaŭ en la klaso. Eĉ tiamaniere oni povas laborigi samtempe la tutan klason!

§ 38 La instruhelpiloj

„Montru bildon kaj eĉ la mutulo ekparolas“ (Usinskij). Laŭ la statistiko la homoj akceptas


la novajn konojn pere de la sensorganoj laŭ la sekva proporcio:

vidsenso	—	87,0 %
aŭdo	—	7,0 %
flaro	—	3,5 %
palpo	—	1,5 %
gusto	—	1,0 %

Tiu statistiko montras la gravan rolon de la videfektaj instruhelpiloj. (Jam antaŭ jarcentoj „malkovris“ tiun fenomenon J. A. Komensky.) Inter la videfektaj helpiloj ni devas distingi du specojn:

- a) la lingvan demonstrilon — t. e. la tekstojn;
- b) la objektajn demonstrilojn — t. e. en la naturo laŭ bildo montri la objekton.


La videfektaj instruhelpiloj helpas la forigon de gepatra lingvouzo: anstataŭ la traduko oni simple montras nature aŭ bilde la objekton (se ĝi estas montrebla). Samtempe la demonstrado helpas elformi rektajn asociativajn rilatojn inter la sonkorpo (grafika korpo) kaj signifo. En la gepatra lingvo tiuj du aspektoj estas adekvataj (la sonkorpo kaj signifo). En la fremda lingvo ne. La celo de la ekzercado estas adekvatigi ilin. Skeme (laŭ Franke)* tiu fenomeno aspektas jene:



S = signifo, Vg = vorto en gepatra lingvo, Vf = vorto en fremda lingvo.

La rilato $S \leftrightarrow Vg$ estas adekvata.

Lernante la fremdan vorton la procezo evoluas jene: kiam la lernanto vidas la objekton en lia memoro aperas la vorto gepatrolingva. Ekz.: „ceruza“ kaj nur post tiu formo aperas „krajono“, t. e. inter la signifo (realaĵo) kaj ĝia lingva bildo (vorto) intervenas la gepatra lingvo:



Nia celo estas krei rektan rilaton inter la objekto kaj ĝia vortbildo en fremda lingvo, do, transformi la vicon: $S \rightarrow Vg \rightarrow Vf$ aŭ $Vf \rightarrow Vg \rightarrow S$ en $S \rightarrow Vf$ respektive $Vf \rightarrow S$, t. e. krei rektan asociativan rilaton. Tion helpas la videfektaj (kaj aŭdo-videfektaj) demonstriloj.

§ 39 La demonstrilojn (instruhelpilojn) oni povas grupigi:

- a) laŭ ilia karaktero:
 - tradiciaj:** nigra tabulo, kreto, lernolibro, kolorkreto, bildoj, fotoj, geografiaj kartoj, modeloj, specimenoj, ludiloj, objektoj naturaj;
 - modernaj-teknikaj:** diapozitivo, epidiaskopoj, gramofono, magnetofono, radio, filmo, televido ...
- b) laŭ ilia efeto: vid-efektaj; aŭd-efektaj; vid-aŭd-efektaj.

* Die praktische Spracherlernung, Leipzig, 1896, p. 31

Jen kelkaj bazaj principoj de ilia uzo:

1. Ne okazu studhorro sen la uzo de iu demonstrilo!
2. Elektu la ĝustan, konvenan helpilon, konforme al la aĝo, intereso, inteligento kaj ĝenerala kapablo de la lernantoj.
3. La instruhelpiloj efikas nur pere de la instruisto: la plej simpla demonstrilo (ekz. skatolo, peco da gumo) fariĝas mirakla demonstrilo en la manoj de lerta instruisto kaj la plej moderna teknika helpilo valoras nenion, se ĝi ne estas uzata ĝuste kaj lerte.

La studhorojn oni devas zorge antaŭprepari. Se la instruisto demonstras diafilmon aŭ aŭdigos magnetofonbendon, li devas antaŭ la studhorro rigardi respektive aŭskulti ĝin. La teknikajn helpilojn instalu dum la paŭzo, je la komenco de la instruhoro ili estu uzpretaj.

§ 40 Laŭ la KA-metodo la instruhelpilojn oni devas intense uzi dum la instruprocezo, ili helpas la instruiston en lia laboro, sed ne anstataŭas lin. Elformiĝis du konceptoj, kiuj preskaŭ ekskluzive bazigas la instruprocezon sur aŭdo-vidajn instruhelpilojn: la t. n. lingvolaboratorioj kaj la t. n. „aŭdo-vida, struktur-globala metodo“ de Guberina kaj Rivenc (la t. n. Saint-Clouda skolo).

En la **lingvolaboratorioj** ĉiu lernanto havas sian apartan budeton, instalita kun magnetofono kaj interligita kun la instruisto. Sekve, dum la sama tempodaŭro ĉiu lernanto povas labori kaj solvi pli da taskoj ol dum la tradicia instruado. La kursano povas ĉiam sin kontroli pere de la surbendigita modelo. La laboratoriaj ekzercoj tre sukcese kontribuas al la elformiĝo de kapabloj, sed ne povas anstataŭi la klaslaboron.

Laŭ la **Saint-Clouda-metodo** ĉiu leciono konsistas el 3 partoj:

- a) dialogo laŭ ĉiutaga situacio;
- b) gramatik-karakteraj struktura dialogo;
- c) konversacio.

Sekve, la instruado okazas en tri fazoj:

- a) enkondukaj ekzercoj;
- b) gramatikaj-strukturoj;
- c) konversacio.

La a) kaj b) fazo diseriĝas jene:

1. Prezento: oni projekcias 2 foje la diafilmon, kaj sinkrone oni aŭskultas la magnetofonan tekston (15—30 bildkadroj respektive frazoj);
2. Kompreno — sen uzo de gepatra lingvo;
3. Imito: La kursanoj post magnetofono ripetas la frazojn, rigardante la bildojn;
4. Firmigo: oni aŭskultas kaj rigardas la materialon po opaj partoj 10—15 foje kaj tiomfoje ripetas ĝin la gekursanoj.
La instruisto parolas nur dum la 2-a faz-ero.)

Sammaniere oni ekzercas la b) fazon. En la c) fazo oni aktualigas la tutan materialon, transmetante ĝin en la konkretan situacion de la gekursanoj.

Resume: Dum la instruado la aŭdo-vidaj efektoj estas maksimume elĉerpataj. La instruiston helpas gvidlibro, enhavanta instrumentodajn konsilojn kaj la tekstojn. La kursanoj ne ricevas tekstojn: ili havas programatajn kajerojn kun presitaj ekzercoj kaj taskoj. Ĝis la 16-a leciono la kurso okazas ekskluzive per la priskribita metodo, poste oni komencas la legajellaboradon, la skribon kaj la legon. La instrumaterialo estas strikte organizita: enhavas 1500 leksemojn de la cel-lingvo. Tradukadon ĝi tute ne uzas. Por la lerneja instruado tiu varianto ne estas tre taŭga. Des pli por la plenkreskulaj kursoj. Sed la plenkreskuloj ŝatas ankaŭ pensadi pri la fenomenoj, serĉi interrilatojn, konsciiĝi pri la lernitaĵo. Tion la metodo ne ebligas. Same ne ebligas hejman laboron kaj preteratentas la gepatro-lingvan bazon.

§ 41 La krominstruhora laboro

Estas grava pedagogia tasko de la instruisto konsciigi, ke la fremda lingvo ne estas simple unu el la studobjektoj, kiun ni lernas, faras taskojn ktp. La lingvo estas kompleksa sistemo de konoj kaj kapabloj, kaj alproprigi ĝin povas nur tiu, kiu ekzercas sin ĉiutage kaj uzas ĉiun eblecon tiucele. Tiu, kiu okupiĝas pri la lingvo nur tiujn du tagojn en la semajno, kiam havas instruhorojn, neniam kapablos regi ĝin. Pro tio la eksterklasa okupiĝo tre gravas. Estas kelkaj formoj, kiujn povas organizi mem la instruisto:

- a) **Kluba vivo:** studrondoj, kluboj, ktp., kie oni parolas nur Esperante, aranĝas programojn kaj organizas eblecojn por praktiki la lingvon. (En la hungaraj lernejoj la akceptita formo estas **fakrondetoj**, organizitaj de KISz-organizaĵo — du horoj ĉiun duan semajnon);
- b) **Ekskursoj:** vizito de muzeoj, urbopartoj aŭ en arbaron — kaj dume uzi nur Esperanton. Oni devas ilin antaŭprepari (Kion ni vidos?) kaj poste oni povas verki pri ĝi mallongajn raportaĵojn, artikolojn por la murgazeto ktp.;
- c) **Hejmaj legaĵoj:** ni eduku niajn lernantojn ŝati la librojn, ĵurnalojn, legi intense kaj taksu tion, kion ili legis.
- d) **La korespondado** estas la plej grava formo de krominstruhora laboro.

La adresateco de la letero kreas kvazaŭ-dialogan situacion, la temojn la lernantoj elektas mem, do apartenas al ilia interesrondo kaj la leter-stilo estas tre proksima al la stilo de ĉiutaga parolo. La korespondadon postulas kaj la pedagogia kaj la didaktika celo de la Esperanto-instruado. La amika korespondado kontribuas al la edukado de internaciismo. Ĝi stimulas la intereson al lingvolernado kaj estas la plej bona okazo ekzerci la produktivan skribkapablon.

La korespondadon oni komencu nur tiam, kiam la lernantoj jam kapablas memstare esprimi siajn pensojn, eĉ se nur limigite (estas konsilinde komenci la korespondadon per bildkarto kun mallongaj tekstoj).

La leteroj estu enhavaj. Ili povas esti bonhumoraj, sed neniam banalaj aŭ ŝablonaj. La lernantoj volonte skribas pri si, pri la familio, hejmo, lernejo, ludoj kaj amuzoj, ili volonte interŝanĝas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn. Pliposte ili skribas pri la lando, literaturo, historio, geografio, kutimoj, muziko, kino, ktp.

La leterojn skribu mem la lernantoj. La instruisto prizorgu nur la finan trarigardon, kiu tuŝu nek la individuecan enhavon, nek la esprimmanieron, sed zorgu nur, ke la lingvo estu korekta kaj la formo konvena.

La leksiko ĉirilate estas kompletigenda per la kutimaj formuloj de la epistola stilo: alparoloj, salutoj, leterkomencaj formuloj, danko, pardonpeto, leterfinaj formuloj. Estas konsilinde gvidi apartan korespondan-taglibron, en kiu oni registru la senditajn leterojn, sendaĵojn, kolektas la valorajn formulojn el la ricevitaj leteroj ktp.

Ĉiu ricevita letero estas respondenda, kaj la eventualaj sendaĵoj rekompendaj.

Krom la individua korespondado oni povas organizi korespondadojn inter grupoj, klasoj, studrondetoj per komune verkitaj leteroj. Sincera kaj afabla korespondado povas gvidi al amikiĝo de du grupoj (klasoj), eĉ al reciproka vizito!

La korespondado, renkontiĝoj, ekskursoj, ekspozicioj, kultur-artaj aktivecoj de diverslandaj lernantoj demonstras ankaŭ la praktikan valoron de Esperanto-instruado. Pro tio la III-a Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn komisiis al Bulgara Lerneja Komisiono organizi centron por kunordigi kaj gvidi tiun laboron. La lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, nepre interrilatu kun la centro kaj aktive partoprenu tiun agadon!

Enhavo

Enkonduko

- § 1 Metodo
- § 2 Celo
- § 3 Karaktero
- § 4 Formo
Esperanto en lernejoj
- § 5 Faktoroj
- § 6 Lingvo — parolo

La studmaterialo

- § 7 La segmentado de lingva materialo; mininumoj
- § 8 La organizado de la segmentita materialo

Instrumetodaj konceptoj

- § 9 Analiza — sinteza; gramatika — traduka
- § 10 F. Gouin
- § 11 Reformo; la rekta metodo
- § 12 Cseh-metodo
- § 13 Bazprincipoj
- § 14 Kurs-komencaj variantoj
- § 15 Miksaj metodoj
- § 16 La KA-metodo

La instruado de la lingva materialo

- § 17 Fonetiko kaj grafiko
- § 18 Leksiko, semantigo
- § 19 Kvanto de leksemoj
- § 20 Gramatiko: indukto-dedukto
strukturoj
- § 21 Funkcia principo

La elformiĝo de kapabloj

- § 22 La kvar-kapabloj
- § 23 La informacia akto
- § 24 La legado: laŭta — muta
- § 25 Analitika kaj sintetika legado
- § 26 Skribo
- § 27 Parolo kaj kompreno

La lerneja praktiko

- § 28 Instruprogramo (instruprojekto)
- § 29 Instruplano
- § 30 Instruho: hortipo
- § 31 Specialaj instruhoj
- § 32 Miksaj instruhoj
- § 33 Enkonduko de nova materialo
 - Demandoj kaj respondoj
- § 34 Legaĵoj kaj legaĵellaboradoj
- § 35 Ekzercado: parola, strukturisma
- § 36 Ekzercado: funkcia principo
- § 37 Skribaj ekzercoj
- § 38 La instruhelpiloj
- § 39 La demonstriroj
- § 40 Lingvolaboratorioj; La Saint-Clouda metodo
- § 41 La krominstruho laboro

Mediosavo en la lernejo

Informo de la Ministro pri Klerigado kaj Scienco (MKS) — Germana Federacia Respubliko

La MKS disponis 135 000 GM por ĝis nun unusola modela eksperimento okupiĝanta pri lerneja edukado al ekologiaj demandoj. La eksperimento apartenas al difinita esplorprogramo elstarigita de la Federacio-Landoj-komisiono pri kleriga planado: La establiĝo de laboresekcio pri „Mediosavo“ por ĉiuj gelemantoj de la sekundarŝtupo I en la Theodor-Heuss-integriginta lernejo en Baŭnatal ĉe Kassel.

Tiu ĉi eksperimento de interkombino de la faksekciaj natur- kaj socisciencaj estas aranĝita kune kun la Heslanda Kulturministerio, kiu kontribuis la samajn financajn rimedojn.

La MKS kaj la Federacia Registaro forte interesiĝas pri la ĉefpunktoj de la eksperimento, ĉar ankaŭ emfaze ampleksiĝas edukaj demandoj en la programo de la registaro:

1. La tradicia disigo de la natursciencaj lernejoj (ĥemio, fiziko, biologio) estu reformita al klara ekspliko de sociaj rilatoj.
2. La demando estos respondenda, ĉu la kooperado de la fakaj sekcioj sociscienca, labor-scienca kaj naturscienco povos doni sencplenan bazon por naturscienciga instruado.
3. La demando devas esti esplorata, ĉu „mediosavo“ fariĝu propra laboresekcio aŭ estu submetata en kurikulajn (curriculum) partprojektojn.
4. Fakinstruistoj de natursciencoj estu motivigitaj kaj plu klerigitaj al la tasko de la ekologio.
5. Klarigende plueblas, kiun signifon havas la projekto por la interna diferencigo kaj kiel povas esti akordigitaj la praktikaj, teknikaj, artaj, lingvaj kaj naturscienc-teoriaj tematikoj al la „mediosava“ problemoj.

La eksperimento komenciĝis je la nova lerneja jaro. Unue estas aranĝita por la 9-a klaso elektdeviga kampo (4 horoj po semajne), en kiu partoprenas lernantoj studentaj la fakojn biologio kaj ĥemio. En kunlaboro kun fakinstruistoj, politikoj kaj lernantoj oni praktikas mediasavajn taskojn. Plie estas ofertite analogie elektdeviga kampo al sepa klaso, kiu sampraktike devas solvi mediasavajn taskojn. Tiamaniere oni volas trovi sencenhavan koncepton.

Giskonstruita per financaj rimedoj de MKS estos baldaŭ la „mediostacio“. Ĝi enhavos fakan ĉambroon, kiu distingiĝos interalie de normala fizika ĉambro, ĉar ekkomencintaj esploraĵoj povas resti, por tiel ebligi longtempan observadon. Krome estas antaŭvidite specialaj aparatoj por aero- kaj akvoesploradoj.

Porinstruista Esperanto-kurso en St. Andreasberg, Harz-montaro

(8-a de novembro ĝis la 13-a de novembro 1971)

Helmut Sonnabend

Generale estas konataj la ĉiujaraj kursoj de la Esperanto-instruistoj en Niedersachsen. Tamen la ĉi-jara kurso distingiĝas de la aliaj en du esencaj punktoj:

- 1-e) ĝi okazis meze de la lerneja tempo kaj
- 2-e) partoprenis nur instruistoj.

La nova paŝo estis risko, ĉar pro la streĉita personala stato en la lernejoj oni devis konsideri rifuzon fare de registaraj prezidentoj. Ni volas transalti ĉiujn malfalcojn, komplikaĵojn, luktojn kaj tuj raportoj pri kelkaj interesaj punktoj.

Jam la grupigo de la kurso estas menciinda. Kunvenis geinstruistoj el ĉiuj lernejoj specoj: popollernejoj, mezgradaj lernejoj kaj gimnazioj. Por nia estonta laboro estas tre valora, ke inter la partoprenintoj estis lingvaj instruistoj, kiel ekz. gimnazia instruisto pri franca kaj angla lingvoj.

Kutime ni laboris en tri grupoj: komencantoj, progresintoj, ekzamenotoj. Por la unua fojo ni dividis ankaŭ la laboron inter la kursgvidantoj. S-ro Peter Kröger, la direktoro de la Germana — Esperanto — Instituto transprenis la historion de Esperanto, fraŭlino Ruff la literaturon, s-ro Sonnabend metodikon kaj gramatikon kaj s-ro Heinrich Müller instruis la komencantojn. Multflankaj parolekzercoj kompletigis la instruplanon. Krome okazis kelkaj prelegoj pri „La situacio de la Esperanto-instruado en lernejoj” (Sonnabend), „Esperanto kiel prepedeŭtiko por la fremdlingva instruado” (Kröger).

Alia prelego estis de rektoro E. Pipho. Ĝi nepre estu pli detale raportenda. S-ro Pipho prelegis pri „Esperanto el la vidpunkto de instruisto pri angla lingvo”. Pipho ne nur estas ĉe ni tre konata kaj rekonata fakulo sed same eksterlande. Li perfekte regas la anglan lingvon, estas aŭtoro de pluraj modernaj lernolibroj, kaj interalie ankaŭ fakkonsilanto pri anglalingvaj kursoj en televido.

Li montris je la ekzemplo de la angla lingvo ties senprecedencan pozicion kiel tipan establitajn lingvon. Apud politikaj kaj pedagogiaj aspektoj li klarecigis la ekonomian. Ekzemple „British Council” eldonas jare miliardojn por zorgeme elpensita sistemo. Sistema programigo de la penso kredigas al la simpaticantoj de la angla lingvo ĝian perfektan pozicion kiel mondlingvon. Sed ankaŭ aliaj lingvaj potencoj (franca, rusa) provas establi sian pozicion, plivastigi kaj konservi ĝin.

Inter la lingvo-gigantoj oni devas vidi la modestan lokon kaj rolon de Esperanto. Kaj tamen Pipho opiniis, ke Esperanto povus plenumi esencan taskon. Li tiurilate substrekis sian senkondiĉan pozitivan sintenon rilate Esperanton. Tio fariĝis videbla, kiam li parolis pri la semantika profilo de Esperanto ĝenerale kaj pri ties de la angla lingvo aparte. Ĉefe la angla lingvo pro ĝia komplika semantika profilo preparas al niaj infanoj grandajn malfacilaĵojn (precipe en niaj popol-lernejoj), malgraŭ de ĉiuj modernaj, metodaj kaj didaktaj klopodoj. Li koncesiis, ke ankaŭ ne pli frua komenco de la anglalingva instruado, jam en la elementaj lernejoj, alportus kontentigan solvon.

Pipho, kiu Esperanton skribe komprenas, eksplikis la simplan semantikan profilon, per kiu oni povas komprenigi al la gelnantoj, kio lingvo estas por si mem.

Li ekkonis sian pretecon kunlabore kun AGEI (Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj) partopreni eksperimenton en tutampleksa lernejo por demonstri, ke antaŭkurso en Esperanto decide plifaciligos la postan lernadon de la angla lingvo. —

Poste la diskuto estis vigla, kaj la partoprenintoj bone komprenis, kion Pipho propre volis diri. Ni esperantistoj faras decidan eraron, ĉiam nur fronte ataki la aliajn lingvajn poziciojn. Nia politiko devas esti des pli fleksebla ju pli malforta nia pozicio estas.

La studsemajno ne finiĝis sen komunaj konkludoj:

- 1-e) nepra daŭrigo de la porinstruistaj kursoj,
- 2-e) multflankaj eksperimentoj en lernejoj, en naciaj kaj internaciaj kadroj;
- 3-e) demokratia rajto de la gelnantoj elekti „sian” lingvon el diverslingva oferto;
- 4-e) pro tio la ĉefa konkludo: Esperanto estu normala studobjekto en ĉiuj lernejoj.

La edukado en Hispanujo

Alfonso Escamilla Roa

Ekde kiam UNESKO deklaris la jaron 1970 kiel Internacian Jaron de Edukado, Hispanujo ekkomencis gravan studadon por la ŝanĝo de la instrusistemo.

La Ministro de Edukado kaj Scienco prezentis „Blankan Libron” kun abunda programo, enhavanta bazojn por revolucia kaj eduka politiko. La ŝtata estraro unuanime aprobis ĝeneralan leĝon pri edukado, kiu detaligas la lernejan sistemon, ĝian organizon kaj objektivigojn adoptatajn al edukaj teorioj. Ĝi esprimas la validajn ideojn pri la socio, pri la homo, pri la esenco de la lernoserva procezo kaj pri la funkcio rilatanta la komunan lernejon.

Tiuj bazoj rekonas la necesecon reformi la landan klerigan sistemon, kiu ankoraŭ instruas laŭ malnovaj metodoj; ili malhelpas rapidan evoluadon de la lernantoj.

La programo estas ambicia, ĉar ĝi akcentas la necesan neniigon de la malprofita tempo pasinta per la nobla kaj efika deziro samniveleigi kulture kun norda kaj centra Eŭropo. Nun oni aktive laboras en la superaj kaj en la subgradaj kampoj de la edukado, ĉar la reformo same celas la universitaton, la mezgradan kaj precipe la unuagradan lernejojn. Vere, Hispanujo tre maltrankvilas pro sia ĝisnuna edukistemo. Sed ni povas aserti, ke hodiaŭ Hispanujo klopodas plibonigi la klerigadon samnivele kiel la aliaj eŭropaj ŝtatoj.

42-a Italia Kongreso de Esperanto

Marina di Grosseto, 18—24 septembron 1971

Fina rezolucio — eltiraĵo

La italaj Esperantistoj, kunvenintaj en Marina de Grosseto de la 18a ĝis la 24a de sept. 1971 ekzaminte de evoluojn, kiujn, danke al Esperanto, oni atingis en la pliboniĝo de la rilatoj inter la diversaj Eŭropaj popoloj, sekve de la eblecoj de interkompreniĝo, kiujn la Internacia Lingvo donas; konsiderinte la neceson plikreskigi la diskonigon de la Internacia Lingvo en la lernejoj;

notinte la proponon pri eksperimenta instruado de la lingvo-Esperanto, samtempe organizanda en la unuagradaj lernejoj de la Eŭropaj landoj, responde al la iniciato de la Sekretariato pri Kulturo de la Slovenia Popol-Respubliko, al kiu jam sin anoncis la lernejoj oficialaj instancoj de Aŭstrujo, Bulgarujo, Jugoslavio kaj Hungarujo;

rekomendas la tujan partoprenon de Italujo al la eksperimento;

emfazas la ekzamenon kaj aprobon de la leĝpropono 1489, kiu ebligas la instruadon de Esperanto en la Italaj mezgradaj kaj superaj lernejoj.

Eŭropa Edukado en la Industriigita Socio

Wijk-aan-Zee Nederlando

de la 26-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro 1971

31-a Konferenco de la Kampanjo por Edukado al Eŭropa Civitaneco

Elsa Otto (delegito de NGGE — Nederlanda sekcio de ILEI)

Generalaj informoj:

Ĉi tiu konferenco estas organizita en kunlaboro kun CEVNO (Centro por Eŭropa Edukado en Lernejoj en Nederlando) sub la aŭspicioj de la Ministerio de Edukado (Hago), la Eŭropa Kultura Fondaĵo (Amsterdamo), la Eŭropa Konsilantaro (Strasburgo) kaj la Eŭropa Komunajoj (Bruselo).

Prezidantoj:

L. van der Gaag, altranga konsilanto ĉe la Ministerio de Edukado (Hago) kaj por Edukado al Eŭropa Civitaneco.

H. W. de Wijn, prezidanto de la Centro por Eŭropa Edukado en Lernejoj en Nederlando (CEVNO).

Sekretariejo:

Ministerio de Edukado, Nieuwe Uitleg 1, Hago, Nederlando.

Lingvo:

La laborlingvo estas la **angla**.

Partoprenantoj:

Docentoj en dugradaj (post-elementaj) lernejoj el Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Danlando, Francujo, Germanujo (FRG), Irlando, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Svislando. (entute 35 personoj)

Prelegantoj:

L. van der Gaag

(Nederlando)

Malfermis kaj enkondukis la konferencon

M. J. F. Govaers

(Svislando)

Ĉefsekretario de la Kampanjo por Edukado al Eŭropa Civitaneco

„La Kampanjo por Eduko al Eŭropa Civitaneco kaj la speciala celo de ĉi tiu konferenco“

Dr. M. van Hulten

(Nederlando)

Direktoro de la Projekto por urbanizado Eŭropa 2000, Eŭropa Kultura Fondaĵo

„Plej gravaj problemoj de la morgaŭa urbanizado“

Drs. J. Pasveer

(Nederlando)

Pastro inter la laboristoj en la Altfornego

„Pozitivaj kaj negativaj aspektoj de la nuntempa industriigita socio en Eŭropo“

Montrado de filmoj pri Roterdamo, la unua mondhaveno el turista, komerca kaj industria vidpunktoj.

Roel van Duyn

(Nederlando)

Estinta membro de la konsilantaro de Amsterdamo „Koboldo“ (tre progresiva)

„Problemoj de la homo rilate al ties medio“

Richard Maine

(Britujo)

„La rolo de la Eduko en la morgaŭa industriigita socio“

Drs. W. Langeveld

(Nederlando)

Direktoro de la Centro por Edukado al Civitaneco en Nederlando

„La rolo de la instruisto en la morgaŭa industriigita socio“

Post ĉiu prelego formiĝis kelkaj diskutgrupoj en kiuj la aŭskultintoj kune preparolis la temon kaj redaktis tiurilatan rezolucion. Dum la lasta tutplena kunsido oni aprobis jenan raporton:

Raporto

1. La plej grava impreso, kiun ĉi tiu konferenco elvokis, estis la konscio pri la krizo koncerne la mediajn problemojn, kaj la konvinko, ke la lerneja programo devus inkludi la pritrakton de sociaj, politikaj, ekonomiaj kaj fizikaj temoj rilatantaj al la medio. La elekto de Roterdamo kaj ties apudaj industriaj ĉirkaŭaĵoj kaj fakte la problemoj de la ŝtato Nederlando, tiel dense loĝata sur tiom malmulte da loko, konstante kaj videble instigis la prelegojn kaj diskutojn.
2. Trovi solvojn por la mediaj problemoj estas la tasko sur politika nivelo, sed la instruista tasko estas igi la lernantojn konsciaj pri tiuj problemoj kaj eduki ilin al respondeca pripensado.
3. Ĉi tiuj programeroj devus esti ĉefa temo en institutoj, kiuj okupas sin pri instruista edukado. Edukado de la instruistoj devus esti daŭra proceso kun oftaj eblecoj al instruigo dum la lernejaĵoj. Profesiaj asocioj kaj naciaj kaj lokaj aŭtoritatoj devus instigi instruistojn sciiĝi pri aferoj de vitala graveco por la socio per partopreno en lokaj, naciaj kaj internaciaj kursoj.

- Instruistoj devus pli kaj pli spertiĝi kaj konscii pri la urĝaj mediaj problemoj. Tro ofte oni konsideras ilin specialaĵoj de geografistoj kaj historiistoj, sed pli vasta deviga pri-traktado en kiu partoprenus sciencistoj, biologistoj, docentoj pri teknikaj aferoj kaj ekonomistoj, povus rezultu en pli vasta kaj pli profunda kompreno de la rilataj temoj.
4. Interŝanĝo de instruistoj kaj studentoj el diversaj landoj povus stimuli la konscion pri komunaj problemoj kaj instigi al pli granda internacia kunlaboro. La starigo de internaciaj kriterioj por diplomoj estus granda paŝo antaŭen.
 5. Rilate al la lerneja situacio oni povus konsideri la edukon al civitaneco el du vidpunktoj:

I. La elekto de la temo kaj la instrua metodo

Mediaj studoj povus havigi la rimedojn por interligi la lernejon kun la socio. En la tuja apudeco eblas pristudi problemojn, kiuj estas ne nur tute klaraj al la lernantoj, sed ankaŭ komunaj al aliaj socioj kaj tial universale gravaj.

Tiaj metodoj povus kontribui al la solvo de la problemoj, ke multaj gejunuloj sentas sin fremdaj kaj forlasitaj.

Ĉi tiu problemoj estas neeviteble pliintensigita de la tendenco al pli larĝaj politikaj kaj ekonomiaj grupigoj, kaj estas malfacile kombini la deziron krei sencon de respondeco ĉe la gejunuloj kun la evidente kreskanta malproksimiĝo al la fontoj de potenco kaj la fortoj decidaj.

Konscio pri la problemoj, kiuj estas komunaj al industriaj socioj entute kaj ties esplorado en la tuja apudeco, povus iel konduki al kultivado de la nocio pri komuna celo kaj interaparteneco.

Ni substreku, ke la studo de mediaj problemoj devus inkludi la devigan pritraktadon menciitan en punkto 3-a, kaj ke tiaj ekzercoj prefere estu aktivaj kaj praktikaj, do ne limigitaj al klasejo kaj lernolibro.

Precipe, la instruistoj devus koncentri la atenton de la lernantoj sur tiujn vivajn nuntempajn temojn, pri kiuj nia socio bone informita devas decidi.

Ili povus ekzemple esplori kaj kolekti faktojn pri la aŭtomobilo en niaj modernaj urboj, aŭ pri la efiko de bruego kaj malpuriĝo kaŭzita de lokaj industrioj.

II. La organizado kaj etoso de la lernejo entute

Rilatoj inter instruistoj kaj lernantoj kaj la tuta interligiteco en kiu infanoj estas lernantaj, estas esence gravaj por la kultivado de postaj sociaj sintenoj. La disvolvado de la senco de reciproka toleremo kaj komprenemo per diskutoj en la klasejo, la senco de instruistaro kaj lernantaro kune laborantaj en la lerneja organizo, la disvolvado de kromaj lernejoj aktivecoj kun maksimuma partoprenado igante la bazajn demokratajn procedurojn familiaraj al la lernantoj, estas rigardataj rekte gravaj por la eduko al civitaneco. La senco de aparteneco al la socio, spertita en la lernejo, ne nur kontribuas al kreskado de la civitana konscio, sed ankaŭ helpas fortigi individuajn personecon kaj memfidon, kaj protektas la junulon kontraŭ sentoj de izolateco kaj fremdeco, kiujn la vasta industria entreprenado povas kaŭzi.

6. Profundaj diskutoj estis dediĉitaj al la edukproblemoj celantaj la modernajn bezonojn al adaptiĝo el vidpunkto de la rapide ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. Estis klare, ke kontraŭaj eliroj estas diskutendaj kaj ke ni bezonas toleremon por la diverseco de opinioj. La eblecoj kaj diversaj manieroj por ludi sian rolon kaj eduki al kuneca laboro certe estas tiurilate aplikeblaj. Esperu ni, ke la alta celo de instruista edukado kaj speciala kontribuo de konstanta enlerneja ekzercado detruos la rigidecon en la sinteno de la instruistaro.
7. La temo de la ekzamenoj elvokis multan diskutadon. La ĝenerala opinio estis, ke por havigi specialistajn scion kaj lertecon necesajn por konfronti la hodiaŭajn problemojn, prezervado de la konstantaj devigaj studkursoj estas esenca, kaj ke tiaj kursoj devus esti submetitaj al iu formo de taksado. Ni tamen samopiniis, ke estas malfacile taksispecon de kvalitoj, kiujn edukado al civitaneco intencas realigi, kaj ke sur tiu tereno ankoraŭ multaj esploroj kaj investaĵoj estas necesaj.

8. La temo de malpuriĝo ludas gravan rolon en la diskutoj dum ĉi tiu konferenco. Ni devas tamen konfesi, ke ankaŭ aliaj produktoj de nia industria socio bezonas konsideron, ekz.:

kontrolo de la popolkreskado kaj popolmovadoj,
 rasaj rilatoj kaj naciaj stereotipoj,
 teknika evoluo kaj ties rilato al milito,
 efikoj de la amasprezentadoj,
 preparado al pli multe da libertempo kaj pli longa vivo.

9. Fine ne estus eble troigi la komforton kaj prizorgadon ricevitajn de niaj gastigantoj, kies amikeco kaj facileco montris admirindan adekvatecon en la organizado de la kurso. La konferencejo krome estis tre taŭga kaj por laboro, kaj por komforto, kaj por plezura amika diskutado dum la mallongaj liberaj periodoj.

Kelkaj personaj impresoj:

Inter la partoprenantoj troviĝis du delegitoj de Esperanto, nome s-ino J. H. Hoekstra-Sieders kaj la subskribintino, kies tasko estis, informi pri Esperanto. Tiucele ni partoprenis en la diskutoj, disdonis la libreton „Wanted a Worldlanguage“ de Prof. Mario Pei kaj la seslingvan broŝuron „La internacia lingvo Esperanto“, montris la Internacian Pedagogian Revuon, informis pri la baldaŭa nederlanda televida kurso pri Esperanto, ktp.

La unuan tagon jam montriĝis, kiom malmulte oni scias pri Esperanto kaj ties celo. Stultaj estis la argumentoj. Precipe la anglalingvanoj konsideris nin frenezaj kaj la ĝenerala sinteno estis nea. Ni sentis nin en la leona kavo!

Tamen iom post iom ni sukcesis klarigi la aferon kaj precipe dum neoficiala babilado vekis la interesigon.

Estis ankaŭ amuzaj momentoj. Vespere ni sidis en amika rondo, kiam dano kaj norvega geedza paro komencis babili en siaj lingvoj. Post kelkaj minutoj la norveganino subite diris: „Mi petas pardonon. Ne estis ĝentile, ke ni parolis nian nacian lingvon!“ „Ho ne, sinjorino“, mi respondis, „vi ne bezonas senkulpigi vin. Estas ja aliaj (kun afabla rideto al la britoj), kiuj ĉiam parolas sian lingvon, tiel devigante nin ĉiam paroli fremdan lingvon.“ La anglino, sidanta kontraŭe al mi, ruĝiĝis kaj poste diris: „Vere, mi neniam pripensis, ke tio povus esti neĝentila. Mi hontas!“

Akcidento okazis ĉe la lasta prelego. La kompatinda prelegonto preparis sian referaton nederlandlingve, supozante, ke ni ĉiuj sidus tie armitaj per kaptelefonoj. Kia bato por li! Eĉ interpretistoj por simultana traduko ne ĉeestis! Do li estis devigita mem angligi sian nederlandlingvan prelegon. Kaj montriĝis, ke tia tuja traduko eĉ por persono kiu bone scipovas paroli la anglan lingvon, estas tre malfacila tasko.

La lingvaj malfacilaĵoj montris sin ankaŭ dum la diskutoj, kiam anglalingvanoj facile kaj rapide debatis, dum alilingvanoj baraktis kaj kun la lingvo kaj kun la problemo mem. El Francujo kaj la aliaj franclingvaj regionoj ĉeestis nur unu persono, kaj ŝi estis profesoro de la angla lingvo!

Je la adiaŭo tamen kelkaj dankis nin pro la informoj pri Esperanto, kaj unu anoncis sin por la skriba kurso al nederlanda ŝtata instrudiplomo por Esperanto (L. O.-Esperanto).

Infanoj lernas Esperanton

Informoj de Vuk Echtner el „Esperantisto Slovaka“

Konsiderante la multajn fervorajn esperantistojn, kiuj senĉese klopodas trovi novajn vojojn kaj metodojn propagandajn por venigi al la movado, al Esperanto laŭeble multajn homojn, la aŭtoro de la artikolo en E. S. plendas pri la granda domaĝo, ke ni ne scias kaj ne zorgas pri la relative multaj infanoj, kiuj lernis kaj ankoraŭ lernas Esperanton.

Por ŝanĝi tiun ĉi situacion la Pedagogia Sekcio de Ĉeĥa Esperanto — Asocio dum aŭtuno fondis novan komisionon, kiu prenas sur sin la taskon, okupiĝi pri la alloga temo „Esperanto kaj infanoj“.

S-ro Echtner akcentas, ke la laborplano de la komisiono ne temas pri akirado de novaj infanoj, sed ĉefe pri prizorgado de multaj infanoj, kiuj Esperanton jam lernis.

(Rimarko de la redaktoro: Volonte IPR akceptas la konkretan planon. Bonvolu sendi ĝin!)

Asociitaj Lernejoj de UNESKO

Raif Markarian, prezidanto de ILEI

Dum multaj jaroj, sub la aŭspicio de UNESKO, elementaj, duagrada kaj aliaj lernejoj kunlaboras pri temoj, sugestitaj de UNESKO aŭ elektitaj de la lernejoj mem. Tiu situacio estas ideala por la partopreno de lernejo, en kiu Esperanto estas instruata. Ĝis nun oficiale partoprenas laŭ nia scio nur unu lernejo en Kimrujo; sed ni aŭdis, ke ankaŭ baldaŭ partoprenos la lernejo, kiun estras s-ro Johano Ingusz, XIII Budapest, Tomori utca 2, Hungarujo.

Se inter la legantoj de IPR estas kolegoj, kiuj ankaŭ ŝatus partopreni kun siaj lernantoj, ili bonvolu skribi pri tio al s-ro Ingusz, aŭ al f-ino Hilda Tharme, 22 Belmont Avenue, Bangor, Caerns, Britujo, la instruistino en la kimra lernejo. Samtempe la lernejo turnu sin rekte al sia propra UNESKO-komisiono kun la peto, ke tiu komisiono rekomendu ĝin al UNESKO kiel partoprenantan lernejon. Se UNESKO aprobas la aliĝon, estas grave, ke la lernejo mem petu al UNESKO, ke ĝi tiam anoncu la novan aliĝon en la oficiala bulteno. Nepre diru, ke via lernejo volas partopreni surbaze de la uzado de Esperanto kiel komuna perilo.

Internacia Lerneja Korespondado (I. K. L.)

S-ro Lentaigne

En la „Freinet“-movado (progresama pedagogia, por enkonduko de novaj edukmetodoj en lernejoj) ni praktikas la I. K. L. ekde la jaro 1924. Okaze de la lasta kongreso de la movado ni revigligis la „Komisionon por interlerneja korespondado per Esperanto“. Nia celo estas instigi la francajn instruistojn ekuzi Esperanton tiucele. Fava cirkonstanco plia ekzistas ekde du jaroj, ĉar la novaj ŝtataj studprogramoj ebligas tiun PER-esperantan laboron (sed ne la POR-esperantan, krom esceptoj). Kolegoj venas al Esperanto (ne pro iu idealo), sed ĉar ili konscias, ke tie kuŝas la bona solvo por realigi sian revon: kontaktigi sian klason kun alilandaj en la tuta mondo. Sed ni frontas al dolora situacio: **ne eblas trovi korespondantojn**. Apenaŭ estas kredeble. Tamen ekzistas en la mondo kolegoj, kiuj akceptus, eĉ deziras korespondigi siajn klasojn (temas pri kolektiva korespondado, en kiuj la instruistoj rolas kiel interpretistoj; do ne gravas ĉu la lernantoj scias aŭ ne scias la lingvon.

La celo de tiu cirkulero estas instigi niajn kolegojn ne-francajn konscii pri tiu problemo kaj reagi favore. Kiel?

Nepre necesas organizi la aferon. Jen tuja propono aŭ pli ĝuste sugesto: en ĉiu lando ekestu faka asocio (prefere sub aŭspicio de ILEI) kun unu respondeculo. Ĝia rolo estos duobla:

1. arigi ĉiujn adresojn de kolegoj, kiuj havas intereson por la afero (internacia kolektiva korespondado, pri kiuj ni donos detalojn al ĉiu petanto);
2. aktiva agado cele disvastigi la aferon en la lando, instigi la instruistojn partopreni ktp.

Se tion ni sukcesos realigi, disvastiĝos tiu internacia lerneja korespondado. Ne nur profitos el ĝi la Francoj, sed la kolegoj el la tuta mondo, kaj Esperanto. Kiam tiu unua paŝo estos farita, ni diskutos poste (ekzemple dum iu „Maribor-Konferenco“) pri detaloj por funkciigi la aferon.

La nuna demando estas:

1. Ĉu vi aprobas la planon?

2. Ĉu vi estas preta iniciati (aŭ kunhelpi) la kreadon de tiu enlanda listo de „korespondemuloj“?
3. Ĉu vi povas doni al mi aliajn nomojn al kiu mi povus min turni?

Nepre respondul Skribu al: S-ro Lentaigne, 3, av. de la Gaillarde, 34 MONTPELLIER, Francio.

La leĝo pri Esperanto-instruado en Aŭstrujo

El la Federacia Leĝo-folio de Aŭstrujo de la 26-a de marto 1968

Esperanto

La celo:

La instruado de Esperanto havas la taskon, meti la multifacetajn klerigajn valorojn de tiu ĉi mondhelplingvo en la ĝeneralan instruadon, por tiel helpi al la junularo senpere enprofundiĝi en la gepatran lingvon kaj kapabligi ĝin, uzi Esperanton skribe kaj buŝe por la bezono de la ĉiutaga vivo kaj apliki ĝin, reciproke al la vivaĝo, por simplaj negocaj kaj komercaj aferoj.

La kono de Esperanto kaj la ebleco uzi ĝin estu tiel perfektigota, ke per tiu estu kreita la bazo por memstara plustudado de la fako, kaj la lernantoj per la Esperanto-literaturo renkontiĝu kun la diversaj nuntempaj kulturoj.

Instrumaterialo

Tria klaso

1. Eduko de la aŭdo kaj flegado de la esprimo:

Alproprigo de ĝusta kaj klara prononco sub aparta priatento de por germanoj fremdaj sonoj kaj de la germana lingvo flankeniĝintaj prononcreguloj.

2. Vort- kaj parolekzercoj:

El la senpera ĉirkaŭaĵo per multflankaj aŭd- kaj parolekzercoj, legado, estu akirata la vorttrezoro, kiu koncernas la medion de la lernantoj, ilian tagan vivon, iliajn spertojn kaj interesojn. Plivastigo de la vorttrezoro per konversacio pri pli malproksimaj temoj tamen ĉiam konsiderante la cirkonstancojn de la taga vivo. Ekzercoj por komprenigi la parolatan lingvon estu la elirpunkto de la instruado sur tiu ĉi ŝtupo; komisioj, ordonoj kaj ilia plenumo; respondo de simplaj demandoj; bilddiskutoj; dialogoj; reproduktive prezenti bone preparitajn legaĵojn; prezenti parkere mallongajn prozaĵojn, poemojn kaj kantojn; ludoj.

3. Gramatiko:

Ellaborado kaj ekzercado de simplaj sintagmoj; ekzemploj de la vortfarado, rezignante kompliki formojn. Uzado de la akuzativo, la prepozicioj, uzado de la prefiksoj kaj konjunkcioj.

4. Legmaterialo:

Mallongaj prozaĵoj; poemoj, proverboj, enigmoj kaj kantoj.

5. Skribaj testlaboroj:

Mallongaj diktaĵoj, komence en senpera ligo kun ellaborita ekzercmaterialo, poste kun novaj vortelementoj; skribo de mallongaj parkerlernitaj tekstoj; respondo de simplaj demandoj pri la enhavo de legaĵoj; simplaj rerakontoj; facilaj transformoj; leteroj; skribaj ekzercoj laŭ bezono.

Testlaboraĵoj: kvar en la lerneja jaro, la unua ne antaŭ decembro.

Kvara klaso

1. Eduko de la aŭdo kaj flegado de la esprimo:

Per profundiĝa konversacio kaj raportekzercoj devas esti akirita pli bona parolkapablo.

2. Vort-kaj parolekzercoj:

Enkonduko en la ĝustan uzadon de vortaro. Parolekzercoj inter la instruisto kaj lernanto, konversacio inter lernantoj, dramigo, ludoj, raportoj pri legaĵoj, komunaj kaj personaj travivaĵoj. La detala flegado de la konversacio kaj raporto devas konsideri la plej gravajn faktojn el la historio de Esperanto, ĝian disvastiĝon, ĝiajn utilajn aranĝaĵojn kaj ampleksi pli longajn rakontojn. Ankaŭ gazetoj, varbiloj i. a. en Esperanto helpas la instruadon.

3. Gramatiko:

Certigo kaj pluevoluigo de la vortrezoro laŭ formo kaj signifo. Profundigo kaj resumo de la fundamenta gramatiko sub detala traktado de la subtilaj diferencoj. Profundigo de la konoj pri la lingva konstruo de Esperanto. Stilaj demandoj, kiel la vortordo, malfacilaj parolturnoj, la leĝo de neceso kaj sufiĉo, la reproduktado de lingvaj bildoj spertas apartan traktadon.

4. Legmaterialo:

Apud priskribaĵoj el la infana vivo kaj plidistanca hejmlando lingve simplaj land- kaj popolkonigaj rakontoj.

5. Skribaj testlaboroj:

Rerakontoj, leteroj kaj raportoj; simplaj komercleteroj. Testlaboraĵoj: kvar en la lerneja jaro.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de la
Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Jarkolekto 3, n-ro 1
Aperas trifoje po jare

Abonprezo 6,— GM, unuopa kajero 3,— GM

Redaktoro: Helmut Sonnabend, rektoro
Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen, Germanujo
Eldonejo: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 1, Germanujo
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56
Bankkontoj: Stadtparkasse Nürnberg 90 157
Bayerische Vereinsbank Nürnberg 5 606 489
Aŭstra bankkonto: Österreichische Länderbank Bregenz 8 891 611
Svisa bankkonto: Schweizerische Volksbank St. Gallen 629 240
La abonprezon oni pagu al la eldonejo

Tarifo por anoncoj:

1 paĝo	250,— GM	1/2 paĝo	125,— GM
1/4 paĝo	80,— GM	1/8 paĝo	40,— GM

Anoncetoj —,25 GM po vorto

ESPERANTO



lingvo de la sporto

Hallo Freund

Saluton amiko

Hello Friend

**Gespräch
zwischen
Sportlern**

**Konversacio
inter
Sportuloj**

**Conversation
between
Sportsmen**

Konversacia frazlibreto por sportuloj kaj amikoj de la sporto en Esperanto,
Germana kaj Angla.

Aŭtoro Ralph L. Harry, aŭstralia ambasadoro en Bonn.

Formato DIN A 5, 32 paĝoj, **prezo 4,— GM**

Inversa Vortaro de Esperanto

laŭ la 6a eldono de Plena Vortaro de Esperanto kun suplemento, kompilita
per komputero de D-ro Klaus Schlueter

Formato DIN A 5, 40 paĝoj, **prezo 4,— GM**

Metodiko de la Esperanto-instruado

de Rudolf Rakuša

Gvidilo por instruantoj de la lingvo internacia

Formato 13 x 20 cm, 189 paĝoj, **prezo 6,— GM**

Mendu ĉe **Ludwig Pickel**, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 1, FRG